




# star<sup>to</sup>

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



1981 · 1 · (83)



## HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon - kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas : la kompleksan kurecadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

ĈEĤOSLOVAKAJ BANLOKOJ  
- oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro -

KARLOVY VARY  
FRANTIŠKOVY LÁZNĚ  
MARIÁNSKÉ LÁZNĚ  
JÁCHYMOV  
TEPLICE V ČECHÁCH  
PODEBRADY  
JÁNSKÉ LÁZNĚ - TŘEBOŇ  
JESENÍK - LUHAČOVICE  
TEPLICE NAD BEČVOU

o o o o o o o o o o o o

**BALNEA**  
Reprezentanto  
de ĉeĥoslovakaj  
banlokoj  
kaj kurac-fontoj,  
Pařížská třída 11,  
110 01 PRAHA 1  
ĈEĤOSLOVAKIO  
Tx: 122 215



# NA PRAHU NOVÉHO ROKU

# 19 81

Nový rok je už tradičně dobou, kdy se lidé zamýšlejí nad tím, čeho dosáhli v letech minulých a čeho chtějí dosáhnout v době nastávající; chtěl bych se proto v duchu této tradice zamyslet - spolu s ostatními esperantisty v naší republice - nad tím, čeho jsme doposud v naší činnosti dosáhli a čeho bychom dosáhnout chtěli anebo dosáhnout mohli.

Esperantské hnutí - a to nejenom u nás, nýbrž na celém světě, bylo vždy hnutím, které aktivně bojovalo za mír: patří to k pokrokovým tradicím esperantského hnutí, které do něho vložil sám iniciátor esperanta, dr. L. L. Zamenhof, pro něhož esperanto nebylo jenom komunikačním prostředkem, nýbrž nástrojem k mírové aktivitě. Naše národy mají to štěstí, že žijí již 35 let v míru, že v této zemi již vyrostly dvě generace, které válku znají jen z historie a z novin. Bojím se někdy, že právě tato skutečnost - spolu s vysokou ekonomickou úrovní naší země - způsobila, že někteří naši členové berou tuto situaci za samozřejmou, že si neuvědomují, že žijí v socialistické společnosti, že právě tato společnost naplňuje ideály, které dr. Zamenhof chtěl dát esperantskému hnutí - mír a porozumění mezi národy. Je dobře připomenout, že u kolébky esperantského hnutí v Československu stáli lidé jako byl F. V. Lorenz, Hybeš, S. K. Neumann, Jindřich Chaloupecký, lidé, kteří se významným způsobem zasloužili o vybudování dělnických socialistických organizací u nás a kteří považovali právě esperanto za přirozenou součást programu dělnického hnutí. Myslím, že i dnes zní nadmíru aktuálně slova, která byla nepsána před sedmdesáti lety do prvního dělnického esperantského časopisu v českých zemích: "Budeme vždy intenzivně hájiti zásady, že politické a kulturní přesvědčení není u esperantisty věcí soukromou a bezvýznamnou, ale budeme vždy prohlášoveti, že skutečný esperantismus jako vyspělá myšlenka může být součástí všeobecného názoru člověka uvědoměle pokrokového, protiklerikálního, protinacionalistického, antimilitaristického a socialistického." /Kulturo, 1912/

Tuto myšlenku je nutno připomínat stále, neboť ještě řada esperantistů - i když nešťastí jen malá menšina - nechce pochopit, že esperanto nemůže jen být zábavným - i když zajímavým - koníčkem, kterým lze se zabývat pro ukrácení dlouhé chvíle. Esperanto je komunikačním prostředkem, prostředkem pro výměnu idejí, názorů a stanovisek mezi lidmi rozdílných národů, ras, jazyků, ale také rozdílných politických přesvědčení, náboženství, světových názorů a společenských postavení. Esperantské organizace - u nás i v cizině - nejsou



a nemohou být prosté hobby-organizace, nýbrž plní, pokud nechtějí zahynout, závažné společenské funkce. Jsme velmi rádi, že i nejvyšší světová esperantská organizace Universala Esperanto-Asocio, jejímž členem je i náš Svaz, považovala za nutné dát jako hlavní téma lonského kongresu ve Stockholmu problematiku ekonomické, rasové, etnické, ženské a jazykové diskriminace, téma bezesporně navýsost aktuální a společensky i politicky neobyčejně významné. Je chybou, že naše esperantské kluby a kroužky nedovedou vždy stejným způsobem, jako naše vrcholná organizace, spojovat problematiku esperanta s aktuálními potřebami naší společnosti a setrvávají často na stereotypní klubové činnosti spočívající v čtení zpráv z esperantských časopisů, úvahami o bezprostředním vítězství esperanta na celém světě, malichernými zabomyšími spory o funkce a kritikou funkcionářů Svazu, kteří nedokázali prosadit zavedení esperanta do škol /úřadů, novin, institucí atd.-podle potřeby/.

Ohlížíme-li se zpět za uplynulý rok i za uplynulá léta, musíme konstatovat, že Český esperantský svaz vykonal pro naše hnutí neobyčejně mnoho: vytvořil pevnou, stmelenou a dobře fungující organizaci, která se štátem obětavých, dobrovolných pracovníků dokázala se prosadit mezi ostatními společenskými organizacemi, vytvořit příznivé ovzduší ve sdělovacích prostředcích pro problematiku mezinárodního jazyka vůbec a esperanta zvláště, zapojit se do mezinárodního esperantského hnutí, vytvořit úzké kontakty s bratrskými organizacemi v socialistických zemích, zahájit poměrně rozsáhlou vydavatelskou činnost, propagovat esperanto v rozličných společenských skupinách a vrstvách, využívat esperanto pro zájmovou, specializovanou, literární a vědeckou činnost. Náš Svaz aktivně pomáhá vietnamským esperantistům politicky a materiálně, velmi významně se podílel na našich i světových akcích pro upevnění míru a v neposlední řadě i výrazně upozorňoval ve svých publikacích na politickou, ekonomickou i kulturní aktivitu našich národů. Jsme rádi, že podobným způsobem jednala i velká řada našich kroužků a klubů: na druhé straně nutno podotknout, že právě v mnoha místních skupinách panují rozpaky nad vlastní činností a nejsou schopny udržet své členy, kteří nenacházejí v klubové činnosti uspokojení, zájem, aktivitu, což se odráží i v neobyčejně silné a nezdravé fluktuaci členstva. I přes neustálý růst členské základny odchází z našich kroužků téměř třetina všech členů ročně. Bylo by dobře, kdyby funkcionáři našich základních organizací se vážně zamysleli nad svou činností, našli nové, neotřelé formy práce a hlavně ukázali neesperantské veřejnosti význam a praktickou užitečnost své práce. K tomu je zapotřebí neuzavírat se do spolkové ulity, navázat spojení s ostatními zájmovými, společenskými a politickými organizacemi. Vždyť právě na esperantských kroužcích a klubech spočívá vlastně celá činnost našeho Svazu; veřejnost neposuzuje ani tak Svaz vcelku jako spíše esperantisty v místě svého bydliště a pracoviště. Podle jeich práce je pak posuzováno kladně nebo záporně i esperantské hnutí u nás.

Téměř se to nehodí do novoročního projevu, ale musím nakonec kousnout i do tvrdého jablka: stále jsou mezi námi lidé, kteří si odreačovávají své nesplněné ambice v práci, společnosti nebo rodině tzv. "aktivitou" pro esperanto. Většinou s nesmírnou dávkou drzosti spolu s neprostým organizačním a jazykovým diletantismem jsou schopni rozbít výsledky práce často několika generací esperantistů a odradit od esperantského hnutí nejenom neesperantskou veřejnost, nýbrž i samé esperantisty. Náš Svaz se musel zabývat - i když naštěstí jenom několika - podobnými jednotlivci, a musel vyvoat proti nim tvrdé důsledky. Nemuselo by k tomu však dojít, kdyby esperantisté sami kritičtěji sledovali činnost podobných "esperantistů" a nedomnívali se, že každý, kdo projeví jen minimální zájem o esperanto, může být také esperantskému hnutí prospěšný. Pro esperantské hnutí a pro jednotlivé esperantisty platí všechny zákony tohoto státu jako pro každého jiného, ať už se jedná o spolkovou činnost, devizové předpisy, zákon o ochraně státu apod.

Věřím pevně - spolu se zdrcující většinou našich členů - že nový rok nám přinese zlepšení naší činnosti, růst členské základny, oživení klubové a odborné činnosti a hlavně - nesmírné uspokojení z aktivní činnosti pro esperantské hnutí i pro celou naši společnost.

Dr J. Jermář, CSc.,  
předseda Čes.esper.svazu

## DANKON AL ĈIUJ

La redakcio de *STARTO*, la funkciuloj kaj laboruloj de la sekretario de nia Asocio kore dankas pro dekoj da bondeziraj okazo de la jaraŝango. Estas vere kuragiga kaj gojiga la certigo, ke oni ne nur akceptas, sed plene subtenas niajn laboron kaj klopodadon.

Same ni deziras al ĉiuoj, ke la jaro 1981 estu por ni jaro de niaj pluaj komunaj sukcesoj en la plenumado de celoj de nia movado.

PhD-ro J. Jermář CSc,   Zd.Křimský,  
prezidanto de ĈEA       sekretario

3

PARTO  
DE LA MEM-  
DELEGITARO  
EN LA MONDA  
PARLAMENTO  
DE LA POPOLOJ  
POR PACO



A L V O K O DE LA MONDA PARLAMENTO DE LA POPOLOJ POR PACO

La popoloj en la tuta mondo estas profunde maltrankviligitaj. La minaco de monda nuklea milito neniam ĝis nun estis sentata tiel akre.

La kresko de la nuklea armilaro kaj la stokado de arsenaloj de la morto atingis nekredblan pivelon. La daŭrigo de tiu proceso starigas la homaron antaŭ la minaco esti neniiĝita.

La "nova nuklea strategio" estas insida trompo por la popoloj; oni provas ilin konvinki, ke estas ebla limigita aŭ loka nuklea milito sen transformiĝo en ĝeneralan nuklean katastrofon. Ni objetas kategorie tiun danĝeran kaj malhumanan doktrinon!

La popoloj en la tuta mondo per abnegacia batalo sukcesis malhelpi en daŭro de pli ol tri jardekoj la eksplodon de monda milito kaj faris tiom da klopodoj en la batalo por sereniĝo; ili ne volas esti ĝi kunkulpuloj en tiuj projektoj. Ili insistas ĉesigi la tintadon de armiloj, ĉesigi la okazigon de agreso kaj milita ĉantaĝo, forigi la minacon de nuklea milito.

Ni apelacigas al la racio kaj sento pri respondeco de la politikaj kaj ŝtataj agantoj kaj alvokas la registrarojn:  
Rifuzu la novajn programojn de armado! Ĉesigu la produktadon de ĉiuj specoj por amasa detruado - raketnukleaj, neutronaj, kemiaj kaj ĉiuj aliaj! Reduktu la armilajn rezervojn! Malpermesu la nukleajn armilojn! Traktadon! Alternativo ne ekzistas!

Ni turnas nin al ĉiuj, por kiuj la paco estas klara:

Hodiaŭ ne sufiĉas esprimi maltrankviligon! Ne sufiĉas signali alarmon! La popoloj estas kapablaj defendi la pacon - kaj tio estas ties fundamenta rajto! Estas necese agi!

Ni flankenlasu ĉion, kio dividas nin! Ni unuigu en la batalo por forigo de la minaco de nuklea milito!

Nia voĉo sonu kun eksterordinara forto! Ni haltigu tiujn, kiuj provas ĵeti la mondon en abismon!



## NIA PORTRETO BOHUSLAV MARTINŬ

/Tomáš Hejzlar/



Unu el la plej grandaj personecoj de tutmonda muziko en unua duono de la 20a jarcento estas la ĉeĥa komponisto Bohuslav MARTINŬ. Lia naskiĝurbo estas Polička, urbo havanta riĉan kulturan kaj socian historion, situante apud la limo inter Bohemio kaj Moravio /proksime al la urbo Litomyšl, kie naskiĝis la komponisto Bedřich Smetana/. Ĉi tie li ekvidis taglumon je la 8a de decembro 1890, en la entura ĉambreto ĉe la kirko de s-ta Jakobo, alte super la ĉirkaŭa urbo; lia patro Ferdinand Martinů estis ĉi tie sufaristo kaj surtura gardisto.

La muzika talento de la malgranda Bohuslav manifestiĝis jam en la frua infanago, ankoraŭ dum tempo, kiam la familio Martinů loĝis en la kirka turo kaj ankaŭ pli poste, kiam ili transloĝiĝis malsupren en la urbon. Unuafoje dokumentis la eksterordinaran talenton de la knabeto la arĉkvarteto Tri rajdantoj, kiu Martinů komponis estante dektrijara, kaj poste publika elpaŝo de la juna violonisto Martinů, laŭ kiu estis decidite pri lia vivovojo: li estis sendita Pragon por studi la konservatorion.

Lia sopiro konatiĝi kun la hejma aĉ kun la fremda kulturo - muziko, vidarto kaj literaturo - instigis la junan Martinů, ke li foriru el la trankvila urbeto, kaj pelis lin al serĉado de artistaj travivaĵoj en Pragon kaj pli poste eksterlanden. Specialaj ĉapitroj en la vivo de la komencanta komponisto estas mallonga epizodo de studado ĉe la komponisto Josef Suk/1922/kaj mallongtempa ludado ĉe la violonpupitro en la ĉeĥa filharmonio sub taktobastono de Václav Talich, antaŭ ol Martinů decidigis, forveturi al studrestado Parizon, al la komponisto Albert Roussel. Tio okazis en la jaro 1923.

La nova medio, fortaj artistaj kaj sociaj influoj kaj amikaj ligoj kun la komponisto Roussel vekis en Martinů novan komponistan penadon. La jaroj, pasigitaj en la pariza artista vivo, estas por B. Martinů karakterizaj per daŭra kontakto kun reprezentantoj de tiama muzika avangardo, per intima konatigado kun verkoj de Igor Stravinskij kaj per ondo de la ĵaza ravi-

ĝo, kiu donis al Martinů vicon da inspiraj impulsoj.

En la jaro 1926 Bohuslav Martinů konatigis en Parizo kun sia estonta edzino Charlotte, lia fidela vivkunulo kaj sindona propagandantino de la verko de la edzo ankaŭ post lia morto en la jaro 1959. La libro de rememoroj far sinjorino Charlotte Martinů sub titolo "Mia vivo kun B. Martinů", prezentanta multnombrajn autentikajn atestojn pri la vivo de la granda komponisto, aperis en kelkaj lingvoj kaj akiris eksterordinaran favoron ĉe legantoj en Ĉeĥoslovakio.

La krea klopodado de Bohuslav Martinů estis nekutime fekunda dum la tridekaj jaroj: la komponisto ekis eminentiga, meze de la tiama vigla pariza kultura vivo, ne nur kiel aŭtoro de muziko ĉambra kaj orkestra, sed ankaŭ kiel sukcesa opera komponisto. Liaj operoj Ludoj pri Maria, Voĉo de arbaro, Komedio sur ponto, Teatro malantaŭ pordego kaj unualoke Julietta - se oni preterlasas la ceterajn gravajn verkojn - estis tre signifaj ne nur en la tempo de la estigo, sed ilia konstanta prezento pruveas ilian artan kvaliton.

Antaŭ la etendiĝanta faŝismo, la komponisto elmigris kun sia edzino tra Hispanio kaj Portugalio en Usono, kien li venis ŝipe post dramaj okazintaĵoj fine de marto 1941. Sed ankaŭ en Usono ne ĉesis Martinů interesiĝi pri la sorto de sia amata naskiĝlando, kiel dokumentas liaj korespondaĵoj, rememoroj kaj antaŭ ĉio lia krea laboro. Lia orkestra komponaĵo Memoraĵo pri Lidice /Memorial to Lidice/ estas eĥo al la tragika fero, forbruligo de la ĉeĥa vilaĝo Lidice far la nazismaj hordoj. Ĝi estas komponaĵo kun profunda idea fono.

Kvankam li pasigis la pli grandan parton de sia vivo en fremdaj landoj /de la jaro 1923 ĝis la morto en la jaro 1959/ - escepte mallongajn vizitojn hejmen antaŭ la komenco de la dua mondmilito - Martinů neniam akceptis falsajn kosmopolitajn konceptojn, neniam li per sia muzika esprimiĝo deflankegis de la ĉeĥa, moravia kaj slovaka muzikaj kulturoj. Ĉiam kaj sub ĉiuj kondiĉoj li sentis sin esti ano de malgranda lando meze de Eŭropo, komponisto ĉerpanta sian muziken esprimon el la hejma medio. Tiu ĉi sintezo de muzikaj elementoj hejmdevenaj kun mondaj muzikaj genroj estas tipa por la kreado de Bohuslav Martinů.

Kaj tiel, meze de ampleksaj komponaĵoj, la komponisto ne unufoje turnis sin al etaj adaptoj de la ĉeĥaj kaj moraviaj popolkantoj, kiuj havis principan signifon por lia kreado. La popola melodieco ravis lin per sia natura spontaneco kaj farigis bonvena kompona materialo por la komponisto dum lia restado en la antaŭmilita Francio, simile kiel dum la nazisma okupacio, kiam li vivis en Usono. Potence influis lian kreadon la hejma faktoro ankaŭ post la milito, kiam liaj kantatoj kun tekstoj de la ĉeĥa poeto Miloslav Bureš akiris intensan sukceson tuj post la estigo. Unu el ili - la kantato Malfermado de putetoj - estas nuntempe unu el la plej konataj muzikaj verkoj de la tuta muzika kulturo.

Kvankam Bohuslav Martinů mortis kiel mondfama artisto la 28-an de aŭgusto 1959 malproksime de sia patrujo, ne ĝisatendinte la tiom sopiratan hejmenrevenon, lia muziko estis la plej konvinka pruvo, ke lia gusta loko situas en la ĉeĥa arto.



-Eltiraĵo el la samnoma libro, eldonata de muzikeldonejo Panton. Ĝi enhavas k.a. ankaŭ Esperantan tekston, tradukitan far A.Stanura.-

---

---

SOMERA ESPERANTO - TENDARO

---

---

5.7.'81 - 18.7.'81 unua etapo  
19.7.'81 - 1.8.'81 dua  
2.8.'81 - 15.8.'81 tria

La Esperanto-Klubo, loka grupo de ĈEA en Třebíč kunlabore kun komisiio de Junularo de ĈEA sub la auspicio de Ĉeĥa Esperanto - Asocio aranĝos la 29 - an Someran Esperanto-Tendaron /SET/. Ĝi okazos en tri etapoj en la tradicia loko apud la granda valbaraĵo lago de Vranov ĉe la vilaĝo Lančov, distrikto de la urbo Znojmo.

La instruado de Esperanto okazos en ĉarma romantika regiono ĉiutage krom la dimanĉo de la 8-a ĝis la 12-a horo en kvin diversgradaj kursoj nome

- A - por komencantoj
- B - por progresintoj
- C - konversacia
- D - por estontaj instruantoj
- E - por tradukantoj

Posttagmeze okazos banado, sportado, ekskursoj, vespere tendarfajroj kun kantado ke. La tendaranoj loĝos kvarope en kabanetoj. La tendarkotizo, kiu inkluzivas kvar manĝojn tage, estas 1200 Kčs, gejunuloj ĝis 15 jaraĵ 1000 Kčs. La aliĝo de eksterlandanoj validas post ricevo de antaŭpago 500 Kčs. Reston oni pagos persone en la tendaro. Post ricevo de via aliĝilo ni informos vin kielmaniere vi sendu antaŭpagon. Aligintaj grupoj devas havi akompananton, kiu bone regas Esperanton. Grupoj de komencantoj krom tio devas havi sian kursestron. Al grupoj de infanoj ni proponas partopreni la 1-an etapon. Gvidanto, kiu akompanas 20 personan grupon ricevos 100% rabaton, gvidanto de 15 persona grupo 75% rabaton, de 10 persona grupo 50% rabaton kaj gvidanto de la 5 persona grupo 25% rabaton.

La ekskursoj - unu tuttaga aŭtobuse kaj du duontagaj dum unu etapo ne estas enkalkulitaj en la tendarkotizo. Ilia prezo estas proksimume 60 Kčs. Ni invitas eksterlandajn samideanojn KUN BONA SCIO DE LA LINGVO, kiuj ŝatas tendaren vivon kaj volas perfektigi.

Por ĉiu etapo ni akceptos nur la unuajn 100 aligintojn, tial ni urĝe konsilas al vi aliĝi plej malfrue ĝis la 15-a de majo 1981. Post tiu ĉi dato ni akceptos vin, se estos ankoraŭ libera loko. La necesajn kompletigajn informojn pri la alveno, restado kaj vivo en la tendaro ricevos ĉiu aliginto kune kun la konfirmo de la akcepto.

Por ke la vivo en la tendaro estu agrabla kaj samideana, la tendaranoj plenumas ĉiujn necesajn helplaborojn senpage. Ple-

numi la tendaran regularon estas devo de ĉiu partoprenanto. Jen kelkaj gravaj eroj:

1. Ĉiu tendarano devas partopreni la instruadon en sia kurso, la tagan programon kaj submeti sin al la fina ekzameno.
2. Forlaso de la tendaro devas esti anoncata al estraro.
3. La bano en la lago estas permesita nur triope. Unu el ili devas esti minimume 18 jara, du el ili devas esti bonaj naĝantoj.
4. Post la vespera signalo devas regi en la tendaro absoluta silento.

Esperanto-Klubo, loka grupo  
de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

CS 674 01 T Ĥ E B Í Ĉ  
Ĉeĥoslovakio

EMINENTA  
ESPERANTISTINO  
VIVJUBILEAS

70

Solena teatro-prezentado omaĝe al la 70-jariĝo de eminenta membro de Divadlo Bratří Mrštíků en Brno Alena Růžičková - Pavlínová okazis la 22.11. 1980 per ludo Mensogulo kaj lia gento de V.K. Klicpera. Post la unua akto parolis de sur la scenejo pluraj gravaj personecoj de la kultura, publika kaj art-mondo emfazante kore, sincere kaj entuziasme multajn nepasemajn meritojn de la jubileantino por la teatro, JAMU, homa socio, ŝiajn vastajn kulturajn horizontojn, ankaŭ Esperanto estis menciita, k.a. Ankaŭ reprezentantoj de la Klubo en Brno RND-ro J. Šikula kaj J. Vondroušek varme salutis la jubileantinon sur la scenejo. Poste parolis Alena Růžičková, dankis, revenis al kelkaj punktoj de la glorigaj paroloj kaj komencis paroli pri Esperanto, ĉarme, sprite, rememorante la UK en Varna kaj klariginte ĝian aktualan signifon por la nuntempo. Ĉio estis akceptita kun granda aplaudo kaj simpatioj. La teatro estis plenplena, 700 lokoj estis plene okupitaj.

Kion ni speciale akcentas estas tio: treege konvenan solenan momenton, en la plej kultura medio, personecon de alte respektata kaj amata artistino kaj krome ŝiaj vortoj pri Esperanto ne estis parolata, sed ardaĵ vortoj kaj el la propra sperto.

Post la prezentado okazis intima amika kunveno por kelkdek invititoj, daŭrinta ĝis frumateno kaj dum kiu ni povis doni al kelkaj gravaj interesatoj pluajn kompletigajn kaj klarigajn informojn.

JVK

ĈEA en la nomo de sia membraro d a n k e m e deziras firman sanon kaj pereinon kontentecon!

# KRAKOVO

la iama ĉefurbo de Pollando antaŭ jarcentoj ĝi donis al la mondo Kopernikon... Ĝi famas pro sia pli ol 600-jara Jagello-na Universitato. Por la esperantistoj ĝi estas konata kiel dufoja Kongresurbo...

La urbo restis ĝis nun kiel majesta arkitektura monumento. Tro grava kaj tro granda por ke sole la lokaj fortoj sukcesu savi ĝin. La tempopaso, malbona klimato, industria polucio endangerigas ĝiajn historiajn postrestaĵojn. Al kelkaj miloj da konstruaĵoj, kiuj memoras la mezepokan kaj de tiam senĉese servis al la lokaj kaj tutmondaj uzantoj - nun minacas ruinigo. Kun ĝranda fortostreĉo de la ŝtataj kaj sociaj fortoj oni nun laŭgrade konservas kaj renovigas la plej ĉefajn monumentojn. Sed ne la unuopaj malnovaj domoj, preĝejoj, fortikaĵoj decidis pri la valoro de la antikva urbo - sed la tuto: la urba kaj arkitektura komplekso de jarcentoj restinta sensange kaj funkcia ĝis nun.

La gravecon de la problemoj montras la fakto, ke UNESCO decidis enskribi Krakovon en la liston de la 12 plej altvaloraj trezoroj de la mondo, konservindaj kaj konservendaj kun la helpo de la internacia kunlaboro.

Sur la historia ĉefplaco de Krakovo troviĝas grandega vitra ŝparkesto. Tie la eksterlandaj turistoj apogas la celon de la monkollektado klarigitan sur la supro de la kesto per la multlingve gravurita surskribo: "Por la renovigo de la krakovaj historiaj monumentoj". Sur la malgrandaj kopioj de la monkollektujo oni aldonadis pli kaj pli de lingvoj... Socia Komitato por la Renovigo de la Krakovaj Historiaj Monumentoj decidis establi la surskribon en Esperanto. De ni - de la esperantistaro de tutmondo dependos, ĉu la esperantlingva kesto ne restos malplena kompare al la alilingvaj. Ne necesas persone enmeti en ĝin moneron. La Banko "Polska Kasa Opieki SA" akceptas ĉiujn monsumojn por la renovigo de Krakovo. Jen la numero de la konto:

PeKaO SA PRZEKRÓJ KRAKÓW 327874 - 600008

Unuopuloj, institucioj, organizaĵoj, kiuj sendos iujn ajn sumojn, ĉu simbolajn ricevos specialajn diplomojn. Ĉiuj nomoj de la mondonacintoj aperos en la ĉefa pola semajnevuo PRZEKRÓJ legata tutmonde de poloj. Pri viaj eventualaj kontribuoj informos ankau la Pola Radio kaj "Pola Esperantisto". Se vi bonvolos donaci sumon, krom via nomo nepre indiku ESPERANTO-n, kiel rimedon inspirantan vin pri tio. Pri via kontribuo informu la Delegiton de UEA en Krakovo /D-ro L. Kordylewski, poŝtkesto 693, 30-960 Kraków/, kaj la korespondaĵojn en Esperanto adresu al: ODNOWA KRAKOWA, Bracka 13, 31-005 KRAKÓW, Pollando.

Pola Esperanto-Asocio





## GRAVEGA PAŜO ANTAŬEN

Pri la dua interlingvistika seminario kun GDR - sciencistoj.

En sia artikolo "Kial Esperanto ne interesas lingvo-scien-  
cistojn" /"Esperanto" 2/1980/ la juna hinda lingvisto kaj  
esperantisto d-ro Propal Daŝgupta asertas, kiel jam montras  
la titolo de lia artikolo, ke lingvosciencistoj ignoras Es-  
peranton. Li listigas kelkajn nekonvinkajn kaŭzojn, entute  
nur rigardas la okcidentandan lingvistaron kaj pravas fakte  
nenion. En mia repliko, kiun publikigis la revuo "Esperanto"  
en n-ro 4/1980, mi i.a. skribis "Daŝgupta neniel pruvis, ke  
"Esperanto ne interesas lingvistojn", sed tion simple kaj tre  
kuraĝe asertas. Daŝgupta evidente eliras de sia scio /aŭ  
impresoj/ pri la okcidenta lingvoscienco kaj tio estas tre  
unuflanka prezento. Almenaŭ mi mem en Germana Demokratia Re-  
publiko tute ne spertis, ke la lingvistojn "Esperanto simple  
ne interesas". Mi povus longe argumenti la kontraŭon, kaj  
tion povas ankaŭ la profesoroj Szerdahelyi, Isajev, Bociort  
kaj aliaj.

Kompreneble, dependas, kial kaj sub kiuj vidpunktoj oni  
prezentas Esperanton al la lingvistoj.

Nu - la subtitole anoncita interlingvistika seminario masi-  
ve fundamentas la ĝustecon de mia repliko al Daŝgupta. Bedau-  
rinde oni entute ne daurigis la diskuton pri la temo en la  
revuo de UEA.

Kio do okazis en Ahrenshoop? La Fakgrupo Interlingvistiko/  
Esperantologio ĉe CLE jam 1979 invitis profesiajn lingvis-  
tojn /neesperantistajn!/ de universitatoj kaj altlernejoj  
de GDR, de la Akademio kaj aliaj instancoj kaj prezentis al  
ili dum 4-taga seminario superrigardajn prelegojn pri prob-  
lemoj de interlingvistiko kaj esperantologio. La sukceso estis  
grandega. Ni detale raportis pri tio en "der esperantist"  
3/79 /n-ro 95/. Krome, kiel kutime ĉe gravaj sciencaj atin-  
goj, ankaŭ "Budapeŝta Informilo" donis riĉan lokon por  
raporto /en n-ro 6/79/. Interese, ke la redaktoro de la UEA -  
revuo "Esperanto" ne opiniis grava la temon kaj presis eĉ ne  
unu frazon pri la seminario. En GDR publikigis raporton la  
prestiga "Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und  
Kommunikationsforschung" 4/1980 kaj la Sciencia Revuo de la  
Universitato Halle 2/1980. Pri la problemoj de la sciencaj  
seminarioj oni ankaŭ komperu mian enkondukon en la antologio  
"La internacia lingvo: sciencaj aspektoj" /Berlin 1979, p.1-7/.

Sed finfine pri la dua interlingvistika seminario mem: Ĝi  
estis je unu tago pli longa ol la lastjare kaj okazis de la  
18a ĝis 22a de novembro 1980. Ankaŭ la preparo distingigis de  
la unua. Se lastjare ni sendis invitleteron kaj 4-paĝan te-  
zaron "Pri la signifo de interlingvistikaj esploroj" al ĉiuj  
lingvosciencaj fremdlingvoinstruaj sekcioj de ĉiuj altlerne-  
joj de GDR, ni ĉijare dissendis la materialon /inkluzive de  
la prilaboritaj tezoj/ al 90 elektitaj lingvosciencistoj de  
GDR. Necesas mencio, ke Kulturligo akiris la specialan per-  
meson de la prorektoro por esplorado de Humboldt-Universita-  
to, ke kiel kuninvitanto ankaŭ funkciu la konata lingvosci-

encisto prof. d-ro Georg F. Meier. Prof. Meier estas tre alt-reputacia lingvisto, estro de la katedro pri komunikada scienco, ĉefredaktoro de la supre menciita "Zeitschrift...." kaj estas konata al absolute ĉiu lingvisto en GDR. /kp. ankaŭ "der esperantist" 4/1980-n-ro 102, p.78 kaj 5/1980-103 p.109/

Jam pro tio la invitmaterialo jam havis certan efikon, eĉ se invititaj entute ne reagis. De la 90 invititoj ĉirkaŭ 10 reagis tre afable kaj interesite, sed motivigis sian neĉeeston per oficialaj aŭ personaj kaŭzoj. Subtrahante la membrojn de la Fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio de ĉifoje partoprenis entute 16 lingvistoj, el ili 12 kiel novuloj, la seminarion. Se 1979 nur ĉeestis du universitataj profesoroj, ĉijare venis 4. De la 23 partoprenintoj entute 17 estis doktoroj /inkluzive la 4 profesorojn/, inter ili d-ro Spitz el ĈSSR.

Speciale grava estis la partopreno de la konata lingvisto prof. d-ro Wilhelm Schmidt el Potsdam, naciopremiito, membro de la Prezidio de la Scienca Konsilantaro por Lingvoscienco ĉe la Akademio kaj membro de la Akademio de Pedagogiaj Sciencoj. Prof. Schmidt havas fundamentajn meritojn en la konstruo de marksisma lingvosciencia teorio kaj de la germanistiko en GDR. Multaj elstaraj verkoj venas el lia plumo. Tre elokvente prof. Schmidt pledis dum la seminario por serioza instituciigo de interlingvistikaj-esperantologiaj esploradoj kaj instruado.

La seminarion ankaŭ distingis pli ampleksa temaro. Lastjare estis entute 12 prelegoj de 9 diversaj prelegintoj. Ĉifoje oni aŭskultis 18 prelegojn de 12 diversaj prelegintoj.

Ankaŭ valoras mencii, ke dum la seminario tempo estis ekspoziciitaj pli ol 100 fakverkoj pri la unuopaj temoj el la privata biblioteko de D. Blanke.

Eĉ komence skeptikaj partoprenintoj ĉe la fino de la seminario verve engaĝis sin por la traktado de interlingvistikaj problemoj kaj por Esperanto. Oni tre konkrete diskutis pri la estonteco de Esperanto en altlernejoj kaj universitatoj.

Kompreneble la gvidantaro de la seminario certigis, ke eĉ ne la vualo de propagando poresperanta povis ekesti. Tio certigis la seriozan kaj sobran, sekve aktivan kaj kreivan sciencon laboratmosferon. Neniu sentis sin primisiomita por la "venko" kaj ĉiu mem, senaltrude, povis tiri siajn konkludojn, kompreneble favore al Esperanto.

Tiun spertorican kaj rezultoplenan seminarion sekvos diversaj kolokvojoj, prelegoj kaj diskutoj en diversaj altlernejoj kaj universitatoj de GDR pri apartaj temoj. La rezultojn oni prezentos en la kadro de la 3a interlingvistika seminario fine de 1981, denove en Ahrenshoop, loko ĉebaltmara, kiu jam fariĝis nocio.

D-ro D. Blanke

## DU GRANDULOJ DE ĈEĤA ROMANTIKISMO

Antaŭ 170 jaroj, la 16-an de novembro 1810 naskiĝis en Prago fondinto de ĉeĥa moderna poezio Karel Hynek Mácha /Maĥa/. Malgraŭ sia kurta vivo /li mortis 5.11.1836/ li vicigis al la plej grandaj personecoj de la eŭropa romantika poezio. Oni nomis lin "revulo kaj ribelulo" kaj al lia heredaĵo adeptigis ĉiuj postaj generacioj de la ĉeĥa literaturo. Li estis la unua ĉeĥa poeto, por kiu la poezio estis ne manifestado de vortuza lerto, sed vera neceso, sorto. La tiutempan romantikan konflikton inter la revo kaj realeco, pri kiu liaj samtempuloj bonkaze nur parolis, Mácha seriozege travivadis. Akcepti iluziojn pri la vivo kaj mondo ne permesis al li impetu volo al vero, kiu radikaligis lian rigardon. Li ne timis rigardi la vizagon de plursignifaj esencoj de l' vivo kaj morto. De siaj samtempuloj li estis apenau komprenita, same kiel oni ne povis plentaksi signifon de lia laboro por la nacio. Kaj tamen estis tiu ĉi "distauzito", peliganta post disviŝaj konturoj de la vorto "patrujo" tiu, kiu en sia ĉefverko, la poemego "Majo" skribis la plej ardan amkonfesion al la hejmo, al patrolando.

En la Metternich-eĉa Aŭstrio kaj la reakcia Eŭropa Sankta Alianco ni trovas la junan poeton ani ĉe ĉiuj ribeloj kontraŭ la despotismo kaj nacia kaj sociala supremado. Same kiel al nomoj de Lermontov kaj Mickiewicz ni devas al nomo de Mácha aldoni epiteton - romantikisto revolucia.

Kaj en la sama tempo ni rememoras la 110-an datrevenon de morto de la alia grandulo de la ĉeĥa romantika poezio, de Karel Jaromír Erben /7.11.1811 - 21.11.1870/. Li estis certasence plena kontrastulo de Mácha. Dum la verko de Mácha intence kaj celkonscie resendas al la propra "mi", al la plej komplete trevivaĵo de tiu "mi" - Erben estas skrupule objektiva kreanto, korpiganta unuecon inter scienculo kaj artisto, kreanto, kies privata "mi" intence perdigas en la nepersona krepusko de la historiista laborejo.

Dum ribelema Mácha estis normodetruanto, por ke ekestu la nova, Erben estis kreanto de la renovigata. Tiu renovigaĵo estis ordo kaj vivonormo de la vivo de ĉeĥa popolo, ĝia etoso, ĝia depratempa sago. Du grandajn fundamentajn verkojn postlasis Erben al siaj sekvantoj. Kolekton de ĉeĥaj popolaj kantoj kaj rimdiraĵoj, kiu kune kun la ĉeĥaj Fabeloj estas rezulto de ega laboro de Erben la kolektisto, kaj unu originalan poemaron "Kytice" /La Bukedo/. En ĝi li transpasis limon de nura parafrazo. La baladoj de tiu libro tipigas kaj monumentigas la sperton de anonima popola kreanto. En tiuj poemoj delonge jam "naciigintaj" Erben anoncigas al sombra fataleco de nesangebla homa sorto, sed tiun fatalecon li superas per tio, ke li emfazas purecon kaj verecon de rilatoj inter homoj kiel bazon de sencoplana komuneco entute.

La ĉefverkojn de ambaŭ plejgranduloj de la ĉeĥa romantikismo, la Bukedon de Karel Jaromír Erben, kaj la poemego Majo de Karel Hynek Mácha tradukis majstre en Esperanton nia karmemora d-ro Tomáš Pumpr, la unua korifeo de nia poezia



tradukarto. La "Bukedo" aperis libre jam antaŭ la Dua mondmilito. La traduko de la ĉefverko de ĉeĥa poezio, "Majo" de K.H. Mácha atendas jam sep jarojn la eldonon. Post la morto de d-ro T. Pumpr transdonis al mi lia edzino tri iom diferencajn versiojn de la tradukoj kun la peto, ke mi elektu kaj adaptu kaj finredaktu la tuton el la plej taŭgaj partoj. Tion mi plenumis jam en la j. 1973, glatiginte ankoraŭ kelkajn versojn. La prespreta manuskripto kun kopioj estis transdonita al s-ino Pumprová, kiu de tiam klopodis trovi eldoniston. Unu kopio troviĝas ĉe mi. Kiu konas la tradukon de "Bukedo" kaj la tradukon de "Bapto de caro Vladimiro" de K.H. Borovský far Tomáš Pumpr, povas imagi pri kia artilaboro temas. La verko meritus, ke la kompetentaj instancoj, ekz. ĈEA serioze ekkonsideru eldonon de tiu nia literatura juvelo en adekvata ekipa.

Jiří Kořínek

---

LA DEVENO DE ANDREO ĈEĤ /ĈE/  
 Historia eseo

---

Marosludas estas loko en Transilvanio. Tia estis ĝia nomo sub la hungara regado. Ludošul-de-Mures estas ĝia nuna nomo, ĉar ĝi kuŝas en Rumanio. En tiu loko naskiĝis la 12-an de septembro 1895, en la familio de ge-sroj Ĉeĥ /pron.ĉeĥ/knabo, baptita je Andreo. Vigla knabo. Antaŭ ol pastrigi post 24 jaroj, li fariĝis esperantisto estante 15-jara. En 1920 li ellaboris en Sibiu novan metodon de kurs-gvidado por Esperanto. Tiu ĉi "rekta" metodo fariĝis poste mondkonata inter esperantistoj. Andreo aktivis en la rumana Esperanto-movado, en Bukareŝto li kun Fischer fondis Rumanan E.-Centron. Lia episkopo liberigis lin de la pastraj devoj kaj li tiel povis dediĉi sin al disvastigado de la internacia lingvo kaj al instruado laŭ sia "Ĉe-metodo". En Svedlando komenciĝis lia triumfa apostolado tra diversaj landoj - kiel notis pri li historiisto. En 1930 li kun ges-roj Isbrücker fondis en Nederlando la faman Internacian Ĉe-Instituton, por eduko de ĉe-metodaj instruistoj. El tiuj ankaŭ nialandaj estis konataj: Dolfa Bartošík en Nederlando /lia edzino estas ja lia nederlanda kursanino/ kaj Jugoslavio, Karel Šolc en Belgio. Kaj Ĉeĥoslovakion klopodis "verdigi" la estona ĉe-instruisto Henriko Seppik kun sia edzino Erika.

Andreo Ĉeĥ-Ceĥ sciis, ke liaj antaŭuloj devenas el inter ĉeĥoj. La prapatroj elmigris en la pasinta jarcento en Transilvanion - tiam ĉio estis unu regno: la aŭstri-hungara. La hungara pastro en Marosludas ĉe la bapto de Andreo, kompreneble, adaptis lian nomon laŭ la hungara skribmaniero, Ĉeĥ /cs pron. ĉ/.

Vizitonte Ĉeĥoslovakion li kunprenis el Rumanio ĉeĥe skribitan leteron, kiu estis gardata ĉe liaj gepatroj. Interpretante de lia prelego en Pardubice /ĉ. la j.1930/ estis s-ano d-ro Josef Fousek, advokato en Přelouč. Ĉeĥ pruntedonis al Fousek la menciitan leteron kun peto provi elserĉi liajn parencojn en nia lando.

La leteron skribis la 4-an de marto 1888 subinstruisto/pod-

učitel/ Jan Čech, en Bohdaneč apud Pardubice, - Bedaŭrinde, ne estas tie la adreso de la ricevonto. Jan Čech /ček/ nomas lin "Tre kara onklo". La adresito do estis la patro, sed pli verŝimile la avo de Andreo Čech. El tiu letero ni sciigas, ke la gepatroj de Jan translokiĝis el Černovice, kiam li estis bebo. /Ne estas dirite kien - supozeble la malproksima onklotion sciis. Ekzistas Černovice en Sudbohemo, alia apud Chomutov, alia ap. Horš. Týn/. Jan konis, krom la gepatroj kaj 7 gefratoj, sole la avinon, kiu loĝis en Zbraslav. En tiu sama urbo la patro de Jan venkis en tribunala proceso. Jan mencias la fratojn Vojtěch /vojťeĥ/, talentan studenton, Václav estis subinstruisto en Kamen, Outěchovice kaj Hořepek kaj poste instruisto en Pacov. En Hořepek Václav edziĝis al fino Pablásko, fratino de pastro; post la mortoj de tiu edzino kaj de sia posta fianĉino li senmoraligis, je granda sufero de la gepatroj. Fratino Zofie edzinigis al Pallier en Ivančice /oficiro/, Manjo al instruisto Dvořák, la eta Boženka ankraŭ frekventis lernejon en Zbraslav. Historia persona ferigis la frato Leander Čech. Ĉeĥa enciklopedio tiel registris lin: "Naskita 1854-11, en Cetoraz /distr. Pelhřimov/, profesoro kaj direktoro en Telč kaj Nové Město na Moravě. Unu el la plej akridaj kaj plej aŭdacaj kritikistoj de la ĉeĥa literaturo /ĉeĥa studaĵoj pri Karolina Světlá kaj V. Hálek/. /La subskribinto mem posedas presitan gazetindikon pri L.Č. kiel aŭtoro de literatur-historia bildo "K. Světlá". D-ro Fousek memoras, ke L. Čech estis kunaŭtoro de lernolibro de ĉeĥa lingvo, dum li studis gimnazio. / "Leandr estas profesoro ĉe la liceo /reálka/ en Telč kun jarsalajro 1.600 florenoj /"zl."/, dum mia jarsalajro estas 400 fl. El ni li fartas plej bone".

Jan petas en la letero sian onklon aŭsendi foton de Aurelia, kuzino de Jan. Kiu scias - geedziĝo povus okazi... El la plua leterparto evidentigas, ke la Čech-familio en Transilvanio troviĝas en tre malbona stato materia, ĉar Jan pardonpetas ke li vere ne povas helpi al ili: el lia monata salajro 32 fl. post la devigaj pagoj, inkl. la manĝon, restas al li sole 2 florenoj... "Dio mem iel helpu vin", li skribas. Ĉefine sekvas salutoj al la "onklinjo kaj al la kuzinoj karaj de la "malproksima" Jan".

Tiun ĉi leteron Andreo Čech pruntis al d-ro Fousek kun la espero pri lia helpo en serĉado de liaj parencoj en nia lando...

La afero restas nefermita. Ne estas al ni konate, ĉu d-ro Fousek ion entreprenis en tiu afero kaj se jes, ĉu li sukcesis. La rolantoj ĉefaj jam forpasis: Fousek mortis antaŭ sep jaroj, A. Čech-Cseh en la pasinta jaro.

La parencoj post tiom da jaroj kaj translokiĝadoj, eble ne estis trovitaj. Sed fakto restas, ke la gepatroj de Andreo Čech estis elmigrintaj ĉeĥoj kun la nomo Čech /ček/, hungarforme Cseh.

Ĉu iu el la Starto-legantoj estos interesata ĉeokaze serĉeti en tiu afero?

Jaroslav Mařík

---

Předsednictvo na své prosincové schůzi projednalo všechny záležitosti v souvislosti s rušivým zasahováním člena svazu J. Kollára, dřívějšího jednatele žel.sekce svazu a uzavřelo tuto záležitost. Přijalo demisi předsedy žel.sekce a do jeho funkce jako úřadujícího předsedu až do konání konference sekce železničářů jmenovalo s.Jaroslava Kašparce, který dosud

## ZASEDALO PŘEDSEDNICTVO SVAZU

vykonával funkci revizora v této sekci. Současně předsednictvo vyzývá všechny železničáře k nové práci.

Předsednictvo rovněž pozvalo k návštěvě ČSSR předsedu IFEF pana Joachima Giessnera, aby s ním projednalo další účinnou spolupráci.

Protože docházejí dotazy, jak se svaz vypořádá s destruktivní činností J. Kollára, sdělujeme, že byl vyloučen z našeho svazu. Jelikož i nadále odmítá předat některý majetek sekce a svazu, svaz požádal příslušný okresní soud, aby mu to uložil.

Předsednictvo svazu svolává plenární zasedání ÚV ČES na 7. března 1981 do Prahy. Všechny důležité záležitosti, které mají být projednány na tomto zasedání, nutno zaslat písemně sekretariátu svazu tak, aby došly nejdéle 6. března 1981.

---

### ĈU VI SCIAS?

Pri la unua Esperanto-lernolibro, gazeto aŭ Kongreso ĉiu esperantisto scias. Sed ĉu ankaŭ pri tio?

-La unua poŝtmarko kun teksto en Esperanto estis eldonita en 1925 en Sovetunio.

-La unua originala romano en E-o aperis en 1907: ĝi estis "Kastelo de Prelongo" de franco Henri Valienne.

-La unua poemo tradukita al E-o estis "Negblovado" de A. Puŝkin en 1888 fare de Antonio Grabowski, kiu post kelkaj jaroj esperantigis la polan epopeon de A.Mickiewicz "Sinjoro Teĉeo".

-La unua internacia Esperanto-geedziĝo okazis en Turku en 1899 inter finnino V.Langlet kaj la svedo S.Blomberg.

-Por la unua fojo utiligis Esperanton en turismo la franca "Touring Club" en 1900.

-La unuaj radio-dissendoj en E-o estis elsenditaj en 1922 en Usono /Newark/ kaj Britujo /Londono/. Ekde tiam li radio-stacioj regule dissendas en E-o: Radio Varsovio ĉiutage tri foje kaj Pekino kvarfoje.

HdE



# internacia panoramo

"LA ANGLA MINACAS ALIAJN KULTUROJN" asertas la nova prezidento de Islando, s-ino Vigdis FINNBOGADOTTIR.

"Jam estas tempo, ke la diversaj nacioj komprenu, ke neŭtrala lingvo povos fariĝi por aliaj kulturoj vera defendomuro kontraŭ la monopolemaj kulturinfluoj de nur unu aŭ du lingvoj, kiel nun ĉiam pli evidentiĝas". La prezidento de Islando esprimis tiun opinion dum intervjuo kun la monata revuo "Monato", eldonata en Belgujo. S-ino Vigdis Finnbogadottir diris: "Neŭtrala lingvo, kiel Esperanto, estus idealo solvo de la interlingva problemo, tio garantius pli da egaleco kaj malpliigus la danĝerojn de lingvo-teknika monopolado de la angla". Laŭ Internacia Gazetara Servo de UEA

"AMIKOJ DE ESPERANTO", la interparlamentara grupo en Italio, havas nun 90 parlamentanojn de sep partioj: ĝia prezidento estas senatano Alberto Del Nero /kristandemokrata/, vicprezidanto deputito Stefano Servadei /socialista/ kaj sekretario senatano Anna Maria Conterno degli Abbati /komunista/.

POLITIKA APOGO. En Nederlando la Evangelia Progresema Popola partio /EPW/ kaj la Calvinista Politika partio /GPV/ rekomendas uzon de Esperanto.

KUNVENO DE KOMPUTISTOJ okazis de 26.12.1980-2.1.1981 en Budapeŝto. Ĝin gvidis prof. d-ro Helmar Frank, Paderborn, FRG. Informojn donas la Grupo de Komputistoj-esperantistoj, Budapeŝto, Pf.193, H-1368.

33a KONGRESO de IFEF okazos la 15.-21.5.1981 en la germana urbo Regensburg ĉe la rivero Danubo. Kongresejo estas en la urbocentro situanta Kolping-domo. Informoj: 33a IFEF-kongreso, Wienerstr.121, D-6000 Frankfurt/M. 70 FRG.

5a JUNULARA FESTIVALO la 16.-21.4.1981 en Porretta Terme, apud Bologna, Italio, temas pri "Esperanto kaj humoro".

SOVETUNIO. Boris Kolker aperigas Esperanto-lecionojn en la ĵurnalo "Komsomolec", Rostov /eldonkvanto 180 000 ekz./.

BELGIO. La 4-an de junio 1980 fondiĝis la asocio "67-a Universala Kongreso de Esperanto", kies sidejo estas Arsenaalstraat 5, B-2000 Antwerpen.

ITALIO. 10 urbaj gardistoj de Verbania sekvas kurson pri la Internacia Lingvo.

KUBO. "Filatelio cubana", oficiala organo de kuba filatelisto federacio en la aprila n-ro 1980 aperigas 10-pagan arti-

kolon pri Esperanto en filatelo. Aŭtoro Hector Juarez Figueredo.

NEDERLANDO. La kongreson de instruistoj pri kordinstrumentoj partoprenis fakuloj el 12 landoj. La delegitojn oficiale akceptis kaj salutis en Esp. la urbestro Mag. F. Winkel el Nooerdwijkerhout.

TASMANIO. Post dekjara interrompo s-ino Eino Loorits organizis en Hobart novan E-rondon kun samtempa kurso.

POLLANDO. La Etnografia Muzeo en Toruń, kiu jam de kelkaj jaroj uzas Esperanton dum sia populariga laboro, organizis Internacian Renkontigon de Popolaj Orkestroj uzante oficiale Esperanton kiel pontlingvon. La aranĝon kunorganizis la Kultura Fako de la Urba Estraro en Toruń kaj la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio. La renkontigon partoprenis 4 eksterlandaj grupoj invititaj helpe de esperantistoj, el Hungario /2/, Jugoslavio kaj Slovakio, krom tio 4 grupoj el diversaj regionoj de Pollando.

USONO. Nova centro: "Sud-Orienta Esperanto-Centro", Box 1042, Indian Rocks Beach, Fl., 33535, SEC, kiu celas reprezenti Esperanton kaj esperantistajn aktivajojn, precipe en la ŝtatoj Florida, Georgia, Alabama, North Carolina, South Carolina kaj Tennessee. Ĝi aktivos ankaŭ sur la eldona kampo. - En Chicago interresuloj povas lerni Esperanton per telefona kurso, bazita sur la lernolibroj de d-ro P. Fox "Mia Tago" kaj la serio "Jen nia mondo". Ĉiu leciono daŭras 15 minutojn kun lego, demandoj kaj respondoj pri gramatiko. La telefona kurso, kiu funkcias 24 horojn seninterrompe, faciligas la hejman studadon. Ĝi estas aranĝita de aŭdvida laboratorio de Universitato de Illinois.

SOCIAJ SCIENCOJ. Fondiĝis internacia asocio de esperantistoj, kiuj okupigas pri la sociaj sciencoj /psikologio, sociologio, antropologio ktp./. Inf. d-ro F. Pignatelli, V. Volotti 5, int.10, I-351 00 Padova, Italujo.

SLOVAKIO: en la lernolibro de slova lingvo por la 5a lernjaro de bazaj lernejoj /pg 24-26/ la ĉapitro estas dediĉita al Esperanto. Esperanto estas ankaŭ uzata en la ekzercaro /pg 11-12/.

SVISLANDO. La nova prezidanto de SES ek de la 4.5.1980 estas d-ro Arthur Baur. Li verkis multe en kaj pri E-o kaj depost 1947 gvidas mallongondajn E-elsendojn de Svisa Radio Internacia.

NORVEGA Esperantisto 5/1980 sur "Fervojistaj pago" publikigas tre simpatian artikolon kun landkarta skizo "La Olomouc - Praha Linio" pri la unua fervojlinio /1845/en niaj landoj. Aŭtoro: ĉeĥa fervojista fakulo Jiří Pištora, kiu en la artikolo samtempe informas pri la historio de la movado en Česká Třebová kaj la 20-jara jubileo de loka grupo "Amikeco".

LA PACAKTIVULO /120-121-1980/ raportas pri la sukcesaj IIa pacrenkontigo en Pardubice kaj la IIIa internacia renkontigo de ercmontraraj esperantistoj en Merklín apud Karlovy Vary. En Eĥoj pri la albumo "Hiroŝima-Nagasaki" aperas du leteroj, unu de loka organizaĵo de Ĉeĥosl. Asocio de virinoj en Karlovy Vary, alia de la Distrikta packonsilantaro en Píbram.

66a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO 25.7. - 1.8.'81

El Oficiala komunikado N-ro 1:

PROTEKTAS LA PREZIDENTO João Baptista de Oliveira Figueiredo, kiu esprimis sian konsenton.

La prezidanto de la Loka Kongresa Komitato estas vicestro de la reganta partio en la brazila Senato kaj, sekve, tre grava persono en la politika vivo de la lando. Temas pri senatano José Lins de Albuquerque, multjara esperantisto - kiel estas ankaŭ lia edzino, Maria Nise Studart Lins Albuquerque, kiu laboras en LKK pri artaj aranĝoj. Pri eksterlanda informado respondecas la konata Esperanta poeto Roberto Passos Nogueira.

RADIOTEKNIKAJ KAJEROJ en HUNGARIO

En Hungario estas planata la eldono de t.n. "Radioteknikaj Kajeroj". Leuplane ĝi enhavos la plej interesajn artikolojn el la diversaj nacilingvaj fak-revuoj. La radiistoj - telekomunikistoj de diversaj landoj estas petataj anonci sin al tiu laboro. La anoncintoj devos elekti unu el siaj nacilingvaj fak-revuoj, kaj el ĉiu n-ro traduki unu eventuale pluajn artikolojn. La kunlaborantoj de la nova E-a fakrevuo ĝenpage ricevos la kajerojn. Estas atendataj la sinanoncoj laŭ la adreso: Szilvási László, 1368 Budapest pk. 193 - Hungario.

POR PROZA RENESANCO

Tiel titoligis la lasta instigo de UEA en 1978 por la konkurso pri la Premio Raymond Schwartz aljuĝota al la plej alte taksita ankoresu ne eldonita beletra prozverko en Esp - o. La verko meritinta la fruntan lokon estas romano titolita "Kiuĵ semas plorante...", kiun kunautoras E. Tofalvi Hungario kaj O. Kníchal Ĉeĥoslovakio. Kiel skribas en la oktobra n-ro de Esperanto B. Ragnarsson, la nova vicprezidanto de UEA kaj estrarano pri kulturo, la romana konkurso donis rezultojn kvante kaj kvalite neatenditajn kaj ĝi estas bela provo pri la latentaj povoj de la Esperanta literatura kulturo.

Al la aŭtoroj gratulis s-ro W. Auld, prezidanto de Akademio de Esperanto, skribante i.a. : "Mi tre senpacience atendas havi la eblecon legi vian romanon ; espereble la instancoj rapidos profiti el tiu eldonebleco..."

Aparte atentindas la fakto, ke la romano estas unua primovada beletra verko en la Internacia Lingvo.



# ni recenzas

Carmel Mallia: KONTRASTOJ. Eldonis la aŭtoro, 89, Sanctuary Str., Zabbar, Malto, 1980. Presis Brita Esperanto-Asocio, 140 Holland Park Avenue, Londono. 48 paĝoj, formato 11,5 x 19 cm, broŝurita. Prezo 6 guldenoj, mendebla ĉe UĜA aŭ ĉe la aŭtoro. Sur la 47 paĝoj troviĝas 49 poemoj de la aŭtoro kaj faksperta enkonduka ĝntaŭparolo de Marjorie Boulton.

Pri la aŭtoro, la malta poeto Carmel Mallia, oni ekscias dorskovriite, ke li estas sanitara inspektoro, naskiĝinta 1929 sur Malto. Li studis filozofion en la jezuita fakultato en Francujo, estas licenciito de la Londona universitato en la franca lingvo, diplomito pri manĝighigieno en Parizo. Liaj poemoj en lingvoj malta, franca kaj Esperanto aperis en pluraj revuoj kaj estis plurfoje premitaj en konkursoj de maltaj kaj Esperantaj poemoj originalaj kaj tradukitaj. El la malta lingvo li publikigis E-tradukon de poemo "La Mio kaj lia pretero" de la nacia poeto Dun Karm.

La poemoj, plejparte modernstilaj, havas varian artisman valoron. Iuj atestas pri ideriĉeco, pri noveco de formo kaj freŝaj metaforoj, pri nepraj dirindaĵoj de la aŭtoro. Tamen plurloke devas la leganto rezoni kaj klopodi elspuri la preskaŭ enĉifritan sencon. Jes, komenci tie, kie la poeto finis, kiel li mem en la Antaŭenkonduko konsilas. Sed ĉi tiel ofte parolas la modernaj poemoj en la naciaj lingvoj, nur, miaopinie, en Esperanto, kie da plene lingvospertaj poeziamantoj estas relative malmulte kompare kun naciaj lingvoj, sukcesas poemoj neenigmaj, artisme kaj estetike aprezebaj eĉ laŭ la modernaj kriterioj kaj tamen ne malfacile kompreneblaj kran-kam ne primitivaj. Carmel Mallia aperas al ni kiel poeto talentita, ie volanta iom perforte serĉi nekutimajn, eĉ bizarajn esprimigojn, poeto evoluanta kaj promesdona por futuro. La libreto estas bonvena pliriĉigo de Esperanta literaturo.

Jiří Kořínek

---

## MEZE DE EŬROPO

---

Jen la nomo de nova libreto, kiun eldonis en tiu ĉi tempo Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

Tiu ĉi libreto - verkita per la plumo tute sobra kaj en telegrafe koncizaj komunikaĵoj - havas celon konatigi la leganton kun plej gravaj periodoj kun turnopunktoj en historio de la du popoloj - ĉeĥa kaj slovaka - vivantaj jam pli ol 6 jardekojn en unu komuna ŝtato meze de Eŭropo.

Kiel foliumado en miljara evento-svarmo la broŝuro tute ne pretendas kompletan bildon. Tamen ankaŭ tuj malmultaj paĝoj kapablas montri al la leganto la ĉeftendencojn de la historia evoluo ilian sencon. Jarcentoj de la ĉeĥa kaj slovaka historio evidentiĝas, ke la sopiro al libereco kaj sociala justeco estis, se ne solaj, do la plej gravaj celoj, por kiuj batalis, versis sangon la husanoj, revoluciaj demokratoj aŭ patriotoj de la lastaj mondmilitoj.

Tiu ĉi ilia mesaĝo do klare interpretas ankaŭ la enhavon de la libreto - unua tiaspeca publikaĵo pri Ĉeĥoslovakio en Internacia lingvo.

La broŝuro enhavas 100 tekstajn pagojn kun fotoj kaj ilustraĵoj el historiaj epokoj. Formato 12,5 x 19,5 cm. Multkolora kovrilpago kun panorama foto pri nuna Praha. Eldonkvanto 5 000 ekz. Prezo 15 ned.gld. aŭ 20 int.rpk. Abonantoj de Star-to povas informiĝi pri prezoj en nacia mono ĉe siaj perantoj. Prezo en Kĉs 15,-. La prezoj ne inkluzivas sendokostojn. Abonantoj, kiuj pagos pere de valutoj aldonu por sendokostoj 10% el la prezo, aŭ sendu kun mendo al nia asocio 2 irpk. Libroservoj povas ricevi kutimen rabaton.

---

#### HORIZONTO DE SOVETA LITOVIO

La revuo estas altnivela, kun riĉa, interesa kaj grava enhavo. Sur 48 pagoj, presitaj per klara ofseto, figuras kontribuaĵoj de 21 aŭtoroj. La ĉefartikolo de la 5-a n-ro konatigas nin kun la historio de Litovio ekde la jaro 1940-1980, skizas ekonomian, socian, industrian sukcesojn kaj impetan evoluon de la lando, raportas pri vigla kultura vivo, teatroj, l broeldonado, kresko de la logantaro kaj de la agrara produktado. Esperantologio estas tie reprezentita per ampleksa pritrakto de: Ortografio de propraj nomoj, lingvistiko per: Traĵtoj de litova lingvo. Litova poezio estas reprezentita per kvar poemoj pezpensaj /Al Litovio, Okuloj, Infanoj de Buhenvald/ kaj serena /Du virinoj/. Ne mankas muzika pago kaj interesa legaĵo. Tre celkonscia kaj sistema estas agado de la litova esperantistaro pere de la internacia lingvo /Litova literaturo, Litova lingvo/ kaj por Esperanto en unuopaj kluboj /entute 21/ per ekspozicioj, tendaroj, sukcesoj en altlernejoj per instruado de E. ktp. La revuo estas sendata en 70 landojn, estas belaspekta kaj taugas por E-ekspozicioj. Per sia kvarhavo ĝi edifas kaj esperigas la laborantojn por la IL.

J.V.

---

#### "KOLEKTANTO" POR KOLEKTANTOJ

La revuo "Kolektanto" estas organo de la sekcio de E-kolektantoj. Ĝi ennavas plej diversajn materialojn: lingvajn ekzercojn, interesajn legaĵojn, artikolojn pri hobiaj, versaĵojn, kantojn, enigmojn, proverbojn, krucvortajn enigmojn, artikolojn pri belarto, fotado ktp. Simple dirite, la revuo zorgas pri la kolektado kaj kolektantoj - filatelistoj, filokartistoj kaj multaj aliaj filo-istoj.

Apero kvaronjara. La artikoloj de la revuo estas skribataj de konataj esperantistoj el Bulgario kaj aliaj landoj kaj de spertaj kolektantoj.

Redakcia adreso por leteroj: "Kolektanto", bul.Hr.Botev 97  
S o f i o 1303, Bulgario

Abono ebla ĉe nia asocio, kie petu koncernajn informojn.

---

## LA MOVADO ESTAS UNIVERSALA, SED NI PENSAS KAJ AGAS EUROPE.

Tia estas la titolo de la enkonduka artikolo en Esperanto 7 - 8/80 kun fresdataj informoj pri la evoluo de nia movado en la mondo. Valora ĝi estas pro publiko de spertoj de Simo Milojevič, redaktoro de la nomita gazeto, kiu havis eblon ĉirkauveturi la mondon por konstati kaj referi pri la stato de la evoluo de Esperanto-movado en unuopaj landoj. Vizitinte Sudan Amerikon, baldaŭ perdis la aŭtoro diŭvastigintan opinion, ke la Esperanto - movado "floras" en Europo, kaj la resto de la mondo estas nur evolukontinentoj. Precipe la spertoj de s-ano Milojevič gajnitaj en Brazilo, la lando de la estonta Universala Kongreso, estas agrable ŝokigaj. Diference de Europo, kie la sidejoj de la landaj asocioj ofte troviĝas en la maldekstra poŝo de la prezidanto aŭ en plej bona okazo en unu el la tirkestoĵoj de la koncerna funkciulo, la k v a r landaj asocioj brazilaj havas proprajn sidejojn, kie ili nestas jam de jardekoj, por organizi esperantan vivon de siaj pluraj miloj da membroj. Pro granda distanco inter la landaj asocioj ne estas eble unuigi ilian agadon. Estas videblaj ĉi tie libroj, kiuj neniam aperis sur la internacia libromarkato. Agrable surpriziga estis renkonto kun movaĵaj homoj, ne nur funkciuloj, kies nomojn oni neniam antaŭe aŭdis kaj kiuj neniam suriris la internacian movadan scenejon, kvankam ili altnivele majstras la lingvoscion kaj detalan informitecon pri la internacia Esperanto-movado. Similaj spertoj estis gajnitaj pri la stato en Bogoto /Kolombio/ kaj Venezuelo. Meĥsika junularo arangos TEJŬ-kongreson. Ankaŭ tie vidis la aŭtoro eldonaĵojn neniam antaŭe renkontitajn, vizitis modernan luksan sidon, aŭdis pri 70-persona seminario en decembro 1979 ktp. Bulteno "Japanio aktivas", kiu komencas malŝlosi strangan pardonon de japanlingvaj Esperanto-periodaĵoj, malantaŭ kiu malŝlosiĝas la japana movado. En Korea respubliko la lingvon lernas tutaj brigadoj da entuziasmuloj, ĉefe junaj. Amasa movado en Irano eĉ nun, en la komplikaj sociaj kondiĉoj ne komencis flagri, sed daŭre flamas. Viglas la movado ankaŭ en Pakistano /eldono de Urdua Esperanta lernolibro, fondo de Pakistana E-Asocio, propagando pri E-o en pakistana televido ktp/. Io okazas en Sirio kaj Egiptio, moviĝas aferoj ankaŭ en Hinda Unio, en Ĉilio kaj Urugvaĵo. En Argentino nun okazis Tutamerika Esperanto-Kongreso, en Kanado baldaŭ sekvos la Pacifika Kongreso de Esperanto, Ĉinio ĉiam pli kaj pli sekvas sian generalan malfermigon ankaŭ rilate la Movadon. Aŭstralio kaj Nov-Zelando ĉiam apartenis al la movade priplugita tereno. Eble nur Afriko estas el la movada vidpunkto nia evolukontinento.

La Movado estas do tutgloba, sed ni agas kaj pensas eŭrope. Ankaŭ tio estas aspekto de diskriminacio, pri kiu okupigis la Kongreso en Stokholmo.

MUDr Josef Hradil



## ELEKTU VI MEM VIAN KATEGORION !

Verŝajne vi konsentas, ke la esperantistoj konsistas el multaj kategorioj, malgrau tio, ke oni ofte nomas ilin "samideanoj". Ni volas preparoli tiujn kategoriojn, kvankam ne eblas garantii, ke ni nomas ĉiujn.

### 1. Bonan-tagon-esperantistoj

Ilia vortprovizo estas tro limigita. Kelkajn esprimojn ili bonege scias, ekz. "bonan tagon", "kiel vi fartas?", "gis revido". Cetere ili ĉiam parolas nacilingve. Tre ofte ili portas grandan verdan stelon.

### 2. Eternaj komencantaj esperantistoj

Dum pli ol jardekoj ili jam studas la Internacian Lingvon, sed ili malmulte progresis. Kiam aliaj esperantistoj alparolas ilin, ili ruĝigas kaj ne scias respondi. Ĝenerale ili tre flue parolas nacian lingvon en esperanto-kunvenoj.

### 3. Filatelist-esperantistoj

Ili volonte korespondas kun ĉiuj landoj, sed nur por interŝanĝi poŝtmarkojn. Cetere ili ne partoprenas esperantistan vivon.

### 4. Vortar-esperantistoj

aŭ promenantaj vortaroj, kontraŭe, scias multege da esperantaj vortoj, precipe tiujn, kiujn oni preskau neniam bezonas. Sed en interparolo kun aliaj ili mallerte balbutas; ili neniam legas libron /krom vortaron/, kaj korespondi ili ne ŝatas.

### 5. Gazet-esperantistoj

opinas, ke ĉiu, kiu pli malpli bone scipovas Esperanton, havas taskon verki gazet-artikolojn. Tiu kategorio senesperigas verajn redaktorojn. Iliaj plumfruktoj ne bongustas. Verkado postulas apartan talenton.

### 6. Klub-esperantistoj

loĝas precipe en grandaj urboj, kie la verda movado floras. Ili regule vizitas la kunvenojn en propra klubo, sed tute ne interesiĝas pri la distrikta, pri la landa aŭ internacia movado, pri kongreso k.t.p.

### 7. Kongres-esperantistoj

plejparte estas fraŭloj /ambaŭseksaj/, loĝantaj izolite en malgrandaj lokoj. Ili havas amikojn en ĉiuj urboj, kie jam okazis internaciaj kongresoj. Sed en la propra loko, urbe-to aŭ vilaĝo ili estas /kaj daŭre estos/ la solaj esperantistoj.

### 8. Gramatik-esperantistoj

favore studas la teorion flankon de nia lingvo. Pri la plej subtilaj gramatikaj demandoj ili scias la sole gustan respondon. Ve, kiu uzas la lingvon ne lau iliaj konsiloj. Ĉiam ili havas ruĝan kraĵonon en la mano.

## 9. Nur-esperantistoj

estas homoj, por kiuj la zamenhofa kreaĵo estas la sole gusta vivocelo. Ili interesiĝas pri nenio alia. Neniam ili legas nacilingvan libron aŭ ĵurnalon. Ilia domo estas plena de esperantaĵoj. Ili portas verdan stelon, verdstelajn ringojn, manikbutonojn, poŝtrancilojn, kraĵonojn; eĉ noktovoŝtoj estas ornamitaj kvinpintstelo. En ĉiu rondo ili parolas daŭre pri Esperanto, ĉiun ili salutas esperantlingve. Ili estas la plej bonaj kontraŭ-propagandistoj de nia movado.

## 10. Politik-esperantistoj

politikas sian ekstreman radikalajn politikan opinion, preferas en la varda movado; verŝajne tial, ĉar ekster tiu movado neniu aŭskultas ilin. Ili estas eksterordinare aktivaj. En ĉiu kunveno aŭ kongreso ili petas plurfoje la parolon, disdonas flugfoliojn, kolportas memverkitaĵojn gazetojn k.t.p. Esperanto estas por ili politika ĉastereno.

## 11. Opozici-esperantistoj

Ŝatas aŭdi sin mem, sed oni malmulte povas diri, ĉu ili samopiniaj kun la gvidantoj. Tial ili ĉiam estas kontraŭ la agoj de la plimulto. Ili ŝatas fortajn, akrajn kvalifikaĵojn kaj senfinajn lamentadojn. Se oni volas kredi al ili, ĉiuj aktivuloj en niaj organizoj estas trompantoj, profitemuloj aŭ diktatoroj.

## 12. Kritikemaj esperantistoj

Tiu kategorio daŭre observas, klasifikas kaj severe prijuĝas la samideanojn. Neniu taugas krom ili mem. La sagi leganto aŭ aŭskultanto verŝajne jam konstatis, ke la verkinato de ĉi tiuj linioj estas unu el la plej tipaj reprezentantoj de ĉilasta kategorio. Probable ni forgesis kelkajn kategoriojn. Ĉu vi, leganto, jam renkontis vian portreton? Au ĉu vi apartenas al la 13-a kategorio?

## 13. La ordinaraĵoj esperantistoj

estas progresemaĵoj, kiuj interesiĝas pri multaj aferoj i.a. ankaŭ pri Esperanto. Ili uzas la lingvon praktike kaj klopodas disvastigi ĝin. Por ili Esperanto estas bona rimedo por atingi altan, tuthomaran kulturon.

El "Espero Katolika" 8/1980

---

## KRONIKO

---

Forpasis niajn vicojn longjara membrino de ĈEA Marie Za - hourková el Polička. Rememoru sin kun ni.

Belan rondan vivjubileon atingis dum la komenco de marto nia fidela kunlaborantino, kiu pri zorgas salaĵojn kaj pluaĵojn financajn aferojn Iva Pokorná el Mělník. Ni gratulas kun vi al ŝi, dezirante multe da sano kaj kontenteco en la vivo.

---

# el leterkesto



Al Ĉeĥa Esperanto-Asocio, P r a h a

Karaj gesamideanoj, nun venis al miaj manoj la bulteno PERSPEKTIVO, kiun vi menciis en STARTO 5/1980 aludante ties kritikinden sintenadon.

En la Septembra /20a/ n-ro de tiu bulteno mi surprizite kaj ĉefe indigniĝinte legis longan artikolon pri nia, vegetarana kongreso ĉijara en Pollando, kiun mi pro gravaj privataj kialoj ne partoprenis, spite je tio, ke mi estas prezidanto de tiu asocio.

Nun sampoŝte mi skribis al nia ĝenerala sekretario, kiu en tiu artikolo estas menciita erare kiel redaktoro, ke li energie protestu ĉe la redakcio de tiu bulteno, ke ĝi publikigis artikolon "pri ni - sen ni", - kun tre gravaj aludoj, nebonaj, negustaj, kiuj povos havi gravajn malbonajn post-sekvaĵojn, - sen niaj anticipaj scio kaj konsento.

Mi opinias necesa informi vin pri tiu ĉi fakto, jam ankaŭ tial, ĉar tiu artikolo domagas ne nur al nia veget.organizaĵo, sed ankaŭ al la tuta Esperantista Movado. - Mi rekomendas konsultiĝi kun UEA, kies aliĝinta kunlaboranta faka organizaĵo ni estas, ke ĝi laŭ sia bontrovo juĝe entreprenu necesan intervenon kontraŭ aŭtoro de tiu artikolo de Perspektivo./Tion mi rekomendis al nia ĝener.sekretario./

La 19-an de decembro 1980

Kun samideana saluto  
Ernesto V á ŝ a,  
962 71 D U D I N C E

## NI Ĵ NEVARTOVK anoncas

En novembro 1980 dum du semajnoj en granda salono de Centra Kulturpalaco "Oktobero" estis organizita granda porsporta ekspozicio, dediĉita al Olimpiado 80 kaj sporto en Sovetio kaj en socialismaj landoj. La ekspozicio estis aranĝita per aktiviloj de la Esperanto-klubo laŭ la decido de Konsilio de Internacia amikeca klubo kunlabore kun urba Junkomunista komitato. La estraro dum malfermo de la ekspozicio substrekis gravan rolon de urba Esperanto-klubo en organizado de la ekspozicio kaj dankegis niajn geamikojn el europaj landoj, kiuj por sporta ekspozicio sendis tre valorajn materialojn pri Olimpiado kaj sporto. Pri la evento informis la urbaj kvar gazetoj.

Sur 12 grandaj tabuloj estis pli ol 200 afiŝoj, gazetoj, salutoj, dokumentoj, libretoj, fotoj kaj aliaj objektoj ricevitaj el pluraj europaj landoj.

La estraro de Niĵnevartovska Esperanto-klubo profunde dankas ĉiujn, kiuj sendis la materialon. La ekspozicio havis grandan sukceson. Aparte interesita estis la junularo kaj la sportuloj. Preskaŭ 150 urbanoj ekdeziris lerni la Internacian lingvon kaj la kursoj jam startis.



En 1981 ni celas denove organizi ankoraŭ pli grandskalan eks-  
pozicion kun interesaj pactemaj materialoj. Tial ni alvokas  
denove por kontribuo kaj kunlaboro kun varma antaŭdanko!

Tutkoran plenamikecan saluton al frataj ĉeĥoslovakaj gees-  
perantistoj!

T. Š u v a j e v,  
vicprez. de KKIA

Niĵnevartovsk  
Sovetunio

V L A D I V O S T O K ...

En For-Orienta havenurbo de Sovetunio Vladivostok antaŭ  
relative nelonga tempo ekĝermis Esperanto-klubo. Nun la Klu-  
bo ricevis eĵon ĉe la novkonstruita Regiona Domo de Junularo.  
Por E-ekspozicio, dediĉote al solena malfermo de la Do-  
mo, ĵuna Klubo bezonas helpojn ankaŭ de la tutmonda esperan-  
tistaro. Vi povas kontribui diversmaniere, tio dependas de  
viaj bontrovo kaj eblo. Ankaŭ nuraj gratulkartoj bonvenas!  
La adreso: USSR, 690039, V l a d i v o s t o k - 39, avenuo  
de 100 let Vladivostoku, 103, Regiona Domo de Junularo, Es-  
peranto-Klubo. Anticipe korajn dancojn!

S. Anikijev, prez. VEKlubo

NORVEGA ESPERANTISTA LIGO al Ĉ E A /la 15an de dec.1980/

Dankon pro via letero kun la laŭdaj vortoj pri nia nova  
broŝuro eldonita esperantlingve de la Ministerio pri Ekste-  
raj Aferoj.

Ni uzas la okazon deziri al vi ĉion bonan por 1981, en kiu  
via laboro por nia movado estu denove plene sukcesa!

John Berggreen, prez. NELigo

**KDS**

**Sedlčany**

KVALITAJ TRANĈ-PRODUKTOJ

Kutirejaj kaj viandistaj tranciloj ĝardenistaj tondiloj de  
diversaj tipoj tondiloj por la kureja prilaboro de kortbirdoj  
higiena ilaro - ungo-fajfiletoj - raspiletoj por la malmola  
hauto

Fabrika KDS SEDLČANY  
ČSSR  
Ekspertas MERKURIA  
Praha

# RONDETA VIVO

**HAVÍŘOV** - La LG invitis prez. de la Paca sekcio de ĈEA kaj de LG en Ostrava-Vitkovice s- anon Drah.Kočvara, ke li prelegu pri gemeligo de lia LG kun s-anoj en Volgogrado. S-ano Drah.Kočvara vizitis tiun ĉi urbon kaj Moskovon en somero kaj la 28.11.prelegis en Havířov, prezentante diapozitivajn. Tiel nia LG partoprenis la aranĝojn ĉe okazo de Monato de Ĉs-soveta amikeco. - La 18.12.prelegis prof. Miroslav Pastrnák, anstataŭante sian malsanan filinon, pri la japana E-movado kaj prezentis al ĉeestantoj multajn materialojn el tiu lando, speciale E-ajn librojn, fotojn pri vizito de s-anoĝ Pastrnáková en Japanio, kie ŝi ĉeestis ankaŭ edzigfeston, kovertojn kun belaj poŝmarkoj kaj multajn kolorajn bildkartojn. - Filatelistoj en Havířov aranĝis ekspozicion, ĉe kiu ankaŭ la prez.de nia LG s-ano Fr. Strumínský ekspoziciis siajn E-ajn filatelajojn. - Pri la agado de nia grupo informis distrikta organo de KPC kaj de la Nacia komitato "Zprávy Karvínska" per artikoloj de A. Stanýna la 25.10.kaj 20.12.80.

**DEČÍN** - dum la kunvenoj oni ne forgesas ankaŭ la instruadon en malgrandaj grupoj. En oktobro estis publika diskut-vespero kun lumbildoj el la tendaro en Lančov. Vesperon gvidis la prezidanto de LG. En novembro ĉiuj grupoj prezentis specimenojn el sia laboro, inter ili ankaŭ ni /informojn, kantojn ktp./.

OAS

**HAVLÍČKOV BROD** - la 8.12.en la prelegĉambro de la Muzeo pri laborista kaj komunista movado la ER,LG de ĈEA ĉe Kultura klubo ČSD okazigis interbabilan vesperon de V.Mašita. Projekciataj estis bildoj el Svedio,Brazilo kaj Japanio. Preĉipe interesaj estis tiuj de japanskribaj skribmaŝinoj kaj la instruo pri ilia uzado. La diapozitivaj de s.J.Žák el la ekskursoj de ER al Hungario - Pollando estis ankaŭ altiraj. La 11.12.en la lernantinhejmo de la sanitara lernejo estis varbvespero,dum kiu 8 lernantinoj anoncis sin por la kurso de E.,kiu sub gvido de s.J.Žák estas jam en fluo.

-eto

**OSTROV n.Ohří** - en sia dimanĉa kunveno la 14.12.1980 la LG decidis, ke pro translogiĝo de s-ano J. Kafka transprenos la gvidon de LG s-ano J.Rybář. Samtempe estis fiksita fundamenta agado: ĉiudusemajna kunvenado kaj komuna korespondado. Okaze de la naskiĝdatreveno de d-ro Zamenhof estis prezentita magnetofone solena koncerto. JK

**TRINEC** - LG organizis en la ĉiunenco de junio septagan autobusan ekskurson tra Slovakio kaj Hungario. La ekskurson partoprenis ankaŭ gesamideanoj el Ostrava kaj Nový Jičín. La 27.9.1980 okazis prelego, kompletigita per projekciado de diapozitivaj kaj amatoraj filmoj, feritaj dum pasintjaraj ekskursoj. Prelegis A.Milatová, projekciis K.Dorotík el N. Jičín. La 25.10. okazis projekciado de diapozitivaj kaj filmoj el la menciita ekskurso tra Slovakio kaj Hungario /s-ano Dorotík,kiu sukcesis rememorigi la ĉeestantojn pri la agrablaĵ travivaĵoj/. LG kunla-

bore kun la Kulturdomo de RSM de Ferindustria entrepreno en Třinec organizas ankaŭ E-kurson por komencantoj kaj progresintoj ekde la 3a de dec. Gvidas Anna Milatová -po-

**ČESKÁ TŘEBOVÁ** - LG aranĝis en decembro memordesperon okaze de la naskigdatreveno de L.L.Z. Interesa prelego pri la evoluo de Internacia lingvo kaj pri la vivo kaj verko de L.L.Zamenhof far la membro Milan Pelcl kaptis atenton de ĉiuj aŭdestantoj. Post la prelego sekvis diskuto, poemdeklamado kaj koloraj diapozitivoj el riĉa dukdekjara historio de LK.

**MĚLNÍK** - ĝis la jarfino 1980 por '81 renovigis sian membre-

con pli ol 80 membroj de LG.

**Ústí n.Labem** - LG aranĝis decembre 1980 en la Pedagogia fakultato ekspozicion de reproduktitaj fotografiaĵoj el la bilda dokumento pri Hiroŝima kaj Nagasaki. La fotografiaĵojn /H. Tkáčová/ kun la ĉeflingva teksto /V. Novobilský/ aranĝis F. Salanský sur 15 paperpaneloj /60 x 85 cm/. Ĉiu panelo estis metita inter du vitrajn tabulojn.

La ekspozicio estas pruntebla al aliaj LG post interkonsento. disponeblaj estas ankaŭ la filmnegativoj por propra prizorgo de la fotoj.

Skribu al V. Novobilský, Školní 5, 400 01 Ústí n.L.



Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

**Korespondi deziras** kun samfakuloj aŭ radioematoroj el ĈSSR 30-jara ingeniero de elektroniko. Juriĵ Galuta, Stroitelĵ 24-7, 332 608 ENERGDAR - USSR.

26-jara naturemiko, ekskursgvidanto volas korespondi kun junaj perpiedaj turistoj, kiuj

ŝatas ankaŭ altajn montojn, sed ne estas rokgrimpuloj, por organizi internacian altmontan marŝadon somere 1981. Adreso: István SZÉL, H-1125 BUDAPEST, Lóránt u.22.

Jozefo Dudas, Miskolc, Engels 28/8/1, H-3529 serĉas kontakton por akiri librojn, gazetojn - ĉefe E-movadajn kaj scienc-teknikajn.

19-jara ĝardenistino fininta fakan mezlernejon volonte korespondos pri ĉio, kio intereseas junajn homojn. Eva BALIČKOVÁ, Smrkovec 31, Hradešice CS - 341 72.

**DONACOJ:** Zd. Kadlečík el Zlín. Paseky Kčs 17,50, Ivana Bejrová el Velké Opatovice 15, -Kčs. Korandankon.

**OSTROV n.Ohří** anonces adresangon de la ER: Jan Rybář, Kollárova 1131/II, OSTROV n.O. CS-363 01



La grupo komitato pritraktis jarraporton de la prezidanto pri la Esperanta agado en 1980. Ĝi vidigas ampleksan laboron en pluraj terenoj:

La grupo plenumis kolekton de siaj devontigoj honore al la 35a datreveno de la liberigo far la Soveta armeo kaj akceptis 8 novajn honore aŭ la 60a jubileo de KPĈ. - La grupo finance subtenis vjetnaman lernejon Ngo Si Liet en Hanojo. - Amplekse estis eluzita lailda dokumento pri la stombombado "Hiroŝima - Nagasaki" - precipe por eduko de la juna generacio kontraŭ armado /Pedagogia fakultato, gimnazio ka./, estis aranĝita ekspozicio de fotografiaĵoj en Pedagogia fakultato, aperis raporto en la preso ktp. - La grupo organize preparis internacian konferencon pri eluzo de E. en scienco kaj tekniko SAEST '80 en Ŭstí n.Labem, kiun partoprenis 90 personoj el 5 landoj. - La publiko de la regiona urbo estis eksterordinare amplekse informita pri Esperanto okaze de SAEST '80 kaj nova kurskomenco per gazetartikoloj, radio kaj informaj peneloj en la ĉefa strato. - Okaze de SAEST '80 aranĝis la grupo koncertan vesperon de kantoj kaj arioj /J. Scholzeová kaj M. Smyčka/ kaj premieron de la kontraumilita teatraĵo far V. Vinař "Ce l' rando de abismo" /E. Seemannová/. - Membroj de la grupo publikigis 5 ĉeflingvajn artikolojn en gazetoj kaj 9 Esperantajn artikolojn. J. Kořinek publikigis 1 originalan kaj 1 tradukitan poemkolektojn. Krom tio aperis 5 liaj poemoj en E. gazetoj. Membroj de la grupo prezentis 3 fakajn prelegojn okaze de SAEST '80 kaj 3 propagandajn prelegojn pri E. en Ŭstí n.L. kaj Děčín. La klubo prezidanto instigis aperigon de 2 ampleksaj artikoloj favore al Esperanto en la regiona organo de KPĈ Průboj far neesperantista redaktoro. J. Kořinek gajnis unuan premion en Floraj ludoj en Barcelono per sia originala poemo. - Novembro elsendis la nordbohemia radio programon pri Esperanto. - Dauras kompletigado de la literatura kartoteko de tradukoj el la ĉeĥa lingvo samkiel kolektado de materialo pri la vivo kaj verkoj de F.V.Lorenz, Th. Čejka kaj J. Krumpholtz. - J. Kořinek reviziis tradukon de la Čapek-verko: Rakontoj el la unua poŝo kaj Rakontoj el la dua poŝo. V. Novobilský finis bibliografion de ĉeĥaj literaturaroj aperintaj en Esperanto kaj kontribuis al la preparata verko pri la viktimoj de la naziista okupacio inter ĉeĥaj esperantistoj. - Kurson por komenculoj gvidis J. Kořinek.

- van -



# Krucigigmo

**HORIZONTALE:** A. Kronologia sistemo /artikolo kaj R/; frukto de falfolia arbo /R/; urbo en Irako, meze de naftoregiono /R/; tro ŝpareme. - B. La dua parto de la moto. - C. Simbolo sur nederlandaj fervojvagonoj; surfaca formo de vetermalkomponiginta kalkstona roko /R/; tuto de spiritaĵaj fenomenoj /R/; sufikso por instrumento; rilatanta temon; nerekte sciigo pri io; korinklino /R/. - Ĉ. Negranda piedvesto /adjektivo kaj R/; nomo de Ĉajkovskij /R/; angle "mapo" /kun nedifina artikolo/; rilata al soko; ne tiu ĝismaleola piedvesto /adjektivo kaj R/. - D. De ĉamoj devenantaj; borderaĵo de bildo /R/; rigidigo /R/; ankoraŭ nelonge vivanta; acida herbo /R/. - E. Titolo de kalifoj /R/; parto de veturilo; vicigo de kaptitoj por kontrolo/R/; helena fablisto /R/; rilatanta kortbirdon; urbeto en Belgio. - F. Dezerta laŭtempa rivero /R/; sudamerika ŝtato /R/; tuto de mikrobaj kolonioj; speco de kambio /R/; automobila konkuro/R/; sufikso de la pasiva futura participo. - G. Finaĵo plurala akuzativa; la kvara parto de la moto; plurala substantiva finaĵo. - Ĝ. Opera solo; vertikala trabo /R/; japana religia grupo uzanta E-on; farita per skriblikvaĵo; rilataj al omoj.

**VERTIKALE:** 1. La unua parto de la moto. - 2. Rilatanta masklan flororganon. - 3. Difinita parto de spaco /R/; ofte ani/sen fina i/; sufikso por parto de tutaĵo. - 4. Usona ŝtato /R/; nomo de greka litero. - 5. Ebenoj limigantaj volumenaĵojn; tekstaĵo kun grandaj interspacoj. - 6. Fera oksido /R/; largbaza vitra botelo por akvo /R/. - 7. Granda vertikale /R/; laboro kun forte odorantaj floroj. - 8. Malpeza motorbiciklo; simbolo de stana sulfido. - 9. Parazita insekto /R/; supera emblemo ĉe kartludo /R/. - 10. Veni returne al la deira loko /sen fina i/; la ĉefa laŭlonga peco en la strukturo de maŝino. - 11. Rivero en Britio; muzika esprimo "En la antaŭa ritmo". - 12. kreskigilo de aktiveco; romie 950. - 13. Eliri el ies vickampo /sen fina i/; nedifina pronomo pri objekto. - 14. Parto de vertebrula skeleto /R/; persono profesie staranta kiel modelo /sen fina o/. - 15. Fiktiva monunuo elpensita de Saussure /R/; Romana Im-

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	12	3	4	5	6	7	8	9	20	1	2	3	4	
A																								
B																								
C																								
Ĉ																								
D																								
E																								
F																								
G																								
H																								

perio. - 16. Foliarboj; streĉi la fortojn. - 17. Al li apartenanta franda bakajo /poseda pronomo kaj R/; internacia simbolo de "signo" /latine "signum"/. - 18. Rilata al roma monero; sporta pluvimuna jako kun kapuĉo /R/. - 19. Rilata valon; de akaro devenanta. - 20. Estulo havanta certan agon; virina voĉo. - 21. Radiko de krania aŭ spina nervo /R/; en nedifinita tempo. - 22. Ĉambro; mondparto; emfaza adverbo. - 23. La plej nombra nacio en Gano. - 24. La tria parto de la moto.

HELPO: R=radiko. - A. Mosul/o/. - C. NS. - Ĉ. A map. - E. Lint. - F. Ued/o/. - 4. Psi. - 10. Sparo. - 11. Usk; a tempo. - 17. Sgn. - 23. Aŝantoj.

Adolf Staŭra

Sufiĉas sendi al la redakcio la ĝustan tekston de la moto, plej malfrue 14 tagojn post ricevo de tiu ĉi n-ro de Starto. Tri solvintoj ricevos libropremiojn.

Moto de krucenigmo el STARTO n-ro 5/80 estis: "VI NE EKKONOS AMIKON - NUR KIAM GLACIO ROMPIĜOS SUB VI".

Josef Filip el Chropyně, ing. W. Hebeda el Albrechtice, Josef Vašek el Olomouc ricevos libron *Maĵstro de Korbója*. Ni gretulas. Ĉer la Starto 6/80 denove malfruiĝis, ni publikos moton de la ĝia krucenigmo en n-ro 2/81. La dato por sendi al moton de n-ro 6/80 restas la 20.2.1981

## INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

### JUNULARO EN 1980 KAJ 1981

Dum la pasinta jaro la ĉeĥa Esperanto-junularo sukcese partoprenis pluraĵn aranĝojn de la junulara komisiono. Temas precipe pri la printempa kaj autuna seminarioj en *V a l t i c e* kaj *P o h o ř e l i c e*, dum kiuj estis instruita trideko de perspektivaj poresperantaj laborantoj kaj estontaj funkciuloj, el kiuj plejparto jam laboras en la junulara kaj turisma komisionoj.

Tre sukcesa estis la junulara etapo de SET Lančov kaj kelkaj aranĝoj en eksterlando - kongreso de TEJO en Finnlando, Junulara Esperanto-Renkontigo en Hungario, seminarioj en GDR, Hungario kaj Pollando. Turisma Semajno en Slovakio entuziasmigiis ankaŭ ĉeĥajn junajn turistojn.

Malpli sukcesa estis Esperanto-Olimpiado, en kiu konkursis nur kelkaj pliaĝaj personoj malgraŭ pli valoraj premioj.

Sufiĉe kontentaj ni povas esti kun la infanaj kaj junularaj Esperanto-rondetoj, t.n. Kluboj de Internacia Amikeco kaj Interkluboj - en la lernjaro 1979/80 funkciis 20 tiaj rondetoj kun 225 membroj. Ankaŭ en la lernjaro 1980/81 startis pluraĵ malmovaj kaj novaj rondetoj sian laboron kaj espereble ankoraŭ ekfunkcios pluaj. La pedagogia sekcio eldonis por infanoj etan diplomon kaj espereble baldaŭ aperigos la porinfanan lernolibron, kiu ĵus aperis en Slovakio.

Kaj kio estas preparata por 1981? Denove du seminarioj por elektitaj perspektivaj gejunuloj, du etapoj de SET Lančov - la unua por rondetanoj, la tria por unuopuloj, sed la junu-



laro helpas ankaŭ en organizo de la dua etapo. Tri arangoj estas planataj por aprilo: renkontiĝo de junaj ĉefaj kaj slovakaj esperantistoj en V y š k o v /10-12.4.1981/, partopreno de junularo en Pacmerŝo en Jablonec kaj aŭtobusa ekskurso al JER en Hungario /organizas la junularo en Brno/. Ni daŭrigos ankaŭ la Esperanto-Olimpiadon. Ĉu ĝi estos pli sukcesa ol en 1980?

### Pedagogická sekce ČES

vydala pro děti do 15ti let diplomek nazvaný

"Diplomo de Esperantisteto",

který je určen jako vyvěščení pro žáky navštěvující esperantský kroužek. Diplomek má povzbudit děti k další účasti na esperantské práci, ukázat jim zájem našeho svazu o mladé esperantisty a zároveň posloužit k získání přesnějšího přehledu o oblíbení mezinárodního jazyka mezi žactvem. Z toho důvodu budou diplomky evidovány a Pedagogická sekce je bude vyplňovat sama. Vedoucí kroužku pošle jména, data narození a adresy dětí, pro které žádá diplomek, a sekce dodá diplomky vyplněné a evidované. Vedoucí kroužku pouze doplní známku dle stupnice: 1 - eminentně, 2 - tre bone, 3 - bone, 4 - sufiĉe, 5 - nesufiĉe, a připojí svůj podpis.

Diplomky mohou děti dostat na konci školního roku nebo v pololetí, při ukončení plánovaného kursu nebo jeho etapy. Dostane-li žák postupem času vícero diplomků, budou se od sebe lišit písmenem, kterým bude lomeno evidenční číslo.

Vedoucí kroužků, vyžádejte diplomky na adrese: Miloslav Malovec, Slovákova 9, 602 00 B r n o .

### III-a INTERNACIA MEDICINA ESPERANTO-KONFERENCO/15-19.7.1981

Je 15-19 de julio 1981 en la bela ĉedenuba urbo Ruse okazos la III-a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco /IMEK / .

#### Temoj de la konferenco : -

1. Zorgoj pri la ĉirkaŭa medio.
2. La internacia lingvo Esperanto kaj la progreso de la medicino.
3. Liberaĵ komunikoj.

Resumojn de la proponataj prelegoj oni povas sendi ĝis la 25.2.1981. Ĉiu prelego / kun eventualaj diapozitivaj / devas daŭri 10 - 12 minutojn.

La konferenco okazos en la jero, kiam la bulgara popolo celebras solene la 1300-jaran jubileon de la bulgara ŝtato. Lige kun tio la konferencenoj ekskursos al la antikvaj bulgerezaj ĉefurboj Pliska kaj Veliko Tarnovo. En embau lokoj okazos prelegoj pri la koncernaj periodoj el la historio de la bulgara ŝtato kaj la senprotekto en tiu tempo.

En IMEK povas partopreni esperantistoj-senlaboristoj/ kura-

ci-stoj, flegistinoj, stomatologoj, spotekistoj, ruĝkruĉanistoj, rentgenologoj, medicin-kemiistoj, veterinarmedicinistoj, higienistoj k.s. enkaŭ el eksterlando/.

Pliajn informojn oni povas ricevi de Bulgara E-asocio, pk. 66, Sofie, Bulgario aŭ ĉe nia asocio. Versajne estos ebla aligi pere de ĈEA kaj pegi en kronoj ĉe nia asocio bezonan restat-kotizon. Pri la prezo ni, dum preparo de ĉi tiu numero ni enkorau ne scias, sed ni traktas kun BEA.

#### RUDĚ PRAVO DENOVE PRI ESPERANTO

informas siajn legantojn en sabato aldono HALÓ SOBOTA. Aperis duonpage artikolo/intervjuo kun nia prezidanto PhDr Jeromír Jermář CSc/ la 17-a de januaro 1981, kie oni informas pri la E-movado en niaj landoj, pri historio kaj nuna situacio pri eblecoj de Esperanto kaj estonteco. Tiu ĉi intereso de la plejgrande kaj plejinflua gazeto ne estas hazarda. Oni povas diri, ke tio estas rezulto de ĉiutage laboro de esperantistoj de la centro ĝis niaj lokaj grupoj.

#### NI VOLAS INFORMI ,

ke vico de fotoj sur la pago 4-5 en STARTO n-ro 6/80 estas portretoj de la estintaj aktivuloj aŭ kunlaborantoj de la VERDA STACIO. Erare ne estis tiu ĉi noto aperinte ĉe la fotoj. Redakcio petas pro pardono.

#### ĈAR VENAS KONSTANTE LETEROJ

kun diversej plendoj pri la ekspedo de gazeto ESPERANTO por homoj kiuj estas individuaj membroj de UEA, ni devas proklami, ke nia asocio ne prizorgas teknikan flankon de la ekspedo. Pri tio respondecas ĉefdelegito de UEA s-ano Rýznar L. el Svitsvy. Do bonvole turniĝu kun viaj demandoj tien, aŭ al UEA. Nia asocio prizorgas ĉefe diversajn financajn aferojn kunligitajn kun la vis membreco al UEA.

#### JUNULARA SEMINARIO EN POHOŘELICE

okazis en hotelo Morava la 28-an ĝis 30-an de novembro 1980 kaj partoprenis ĝin ĉirkaŭ tridek homoj. La prelegintoj, ĝesamideanoj Podhradská, Pisk, Dadak kaj Vlastimil Kočvara, instruis la junularon pri laboro en la lokaj grupoj kaj en la sekcioj kaj komisionoj pedagogika, politikeduca, turisma kaj literatur-artisma kaj klarigis la metodojn de la asocia ekzameno kaj de la eldonado de libroj. Ĉiuj partoprenintoj de la seminario submetiĝis al enketado, dum kiu kelkaj akceptis laboron en la turisma sekcio kaj kelkaj en la junulara komisiono. Tri membroj de la junulara komisiono eksmembris pro familiaj kauzoj, tial estis akceptitaj tri novaj membroj kaj pluraj aktivistoj - kunlaborantoj.

La seminario partoprenis ankaŭ reprezentantino de la slovaka sekcio de junaj esperantistoj, Eva Gajdošíková, kiu informis pri la situacio en ilia sekcio.

KELKAJ E - ARANĜOJ en 1981 en ĈEĤOSLOVAKIO kaj Hungario ●

Ĉeĥoslovakio:

1. 24. - 26.4. Printempa Esperanto-renkontigo en Altaj Tatroj, hotelo Esperanto prezo Kčs 400,-  
Informoj, aliĝoj : AE SSR
2. 25. - 27.4. Internacia Printempa Pacmarŝado en Jablonec nad Nisou kun konatiĝvespero kaj trarigardo de la ĉirkaŭaĵo prezo Kčs 450,-  
Informoj, aliĝoj : ĈEA
3. 11. - 24.7. Somera Esperanto-lernejo, Košice  
Informoj, aliĝoj : AE SSR prezo Kčs 1600,-
4. 24. - 30.7. Turisma semajno en Slovaka Paradizo  
Informoj, aliĝoj : AE SSR prezo Kčs 800,-

Hungario:

5. 4. - 6.4. Szobathely - Junulara Esperanto-Renkonto  
Organizas Junulara Komisiono de HEA,  
Budapest, Pf.193, H-1368
6. 15. - 17.5. Börzsöny - Zebegény  
Zamenhof Internacia Pacmarŝo  
Organizas Budapeŝta Komitato de HEA,  
Budapest, Pf.153, H-1443
7. 22. - 28.6. apud Balatono  
Mezlerneja Ripoztendaro  
organizas Junulara Komisiono de HEA  
Budapest, Pf.193, H-1368
8. 5. - 11.7. Gyula  
19-a Somera Esperanto-Universitato  
Organizas Konsilantaro de SEU  
Gyula, 48-as u.11. H-5700
9. 4. - 5.7. Pécs  
Fervojistaj Esperanto-Renkonto  
Organizas Fervojistaj Fakgrupo Esperanto  
Pécs, Pf.2. H-7601
10. 7. Zánka  
14-a Pionira Internacia Tendaro  
Organizas Teritoria Komitato de HEA  
Pécs, Pf.2. H-7601
- 11.20. - 29.7. Abaliget  
14-a Internacia Renkonto Naturamika  
Organizas Teritoria Komitato de HEA  
Pécs, Pf.2. H-7601

LITERATURA SEKCIO ●

La ĉeestantoj de plua kunsido de Literaturo sekcio de ĈEA, 11.12., aŭskultis kun intereso la poemaron de J. Rumler "Elportado de violono" laŭ elekto kaj prezento de Eva Seemanová, kaj larĝbazan eseon "La IL laŭ la vidpunkto de bezonoj de la nuntempa literatura kreado", prezentita de la aŭtoro J. Rumler. jm



## POSLEDNÍ ZVONĚNÍ .....

Chceme upozornit všechny naše současné členy, kteří dosud ne poukázali svůj členský příspěvek, aby tak neprodlenně učinili ať již prostřednictvím svých základních organizací/pokud jsou jejími členy/ anebo přímo na adresu svazu. Další číslo STARTO, které přinese mimo jiné již i mnoho zajímavostí z Brazílie, země v níž se bude letos konat 67. mezinárodní kongres Esperanta, by již nedostali a navíc by přestali být členy naší organizace.

### Plus internacia sukceso de niaj aŭtoroj

En Internacia literatura konkurso, kiun aranĝis la "Fundación Esperanto" en Zaragoza /Hispanio/, gajnis I-an premion s-o Bernard GOLDEN /Veszprém, Hungario/ pro la konkursejo "La origino de la morto", kaj la II-ajn premiojn s-o Jindřich TOMÍŠEK Prerov, ČSSR/ pro la disertaĵo "Nia vilaĝo, popolo kaj popola kanto" - kaj s-o Valdemar VINAR /Cheb, ČSSR/ pro la historia rakonto "La astronomia horloĝo en Prago".  
Ni vere sincere gratulas!

---

### Indekso de STARTO 1980

	n-ro	paĝo
<u>Konsideroj, komentoj:</u>		
- novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA	1	3
- ne nur nia asocio...	1	
- komenco estis antaŭ tridekkvin jaroj	2	3
- heredaĵo de la laborista korpedukado	3	3
- ne nur en FRG	3	5
- 65a UK de Esperanto	4	3
- jubilea kongreso de BEA	4	5
- gratulon al Tokio	4	9
- limigo de elspezoj	4	10
- kiamaniere igi en LG	4	27
- saman opinion ankaŭ ni havas	5	3
- certe malfacile ne satiron skribi	5	4
- rememoroj pri Verda Stacio	6	3
- verda estas nia flago	6	7
- oficiala komuniko de Akademio de Esperanto	6	14
- jubileo de la Ĉeĥoslovaka E - movado	6	21
<u>Organiza vivo:</u>		
- junularo de ĈEA	1	9
- rondeta vivo	1,2,3,4,5,6	21,17,18, 25,20,23
- kroniko	1,2,3,5,6	23,26, 17,21,23
- informoj de sekretariejo	1,2,3,4,5	24,25, 24,31,23
- baza informo pri seminario de apliko de E-o	1	29

	n-ro	paĝo
- printempa kunsido	2	5
- junulara seminario	2	9
- rezolucio de IIA renkontiĝo de pacdefendantoj	2	12
- interesa statistiko	2	16
- ĝemeliĝo PACOV - PÉCS	4	28
- apliko de E-o en tekniko kaj scienco	5	5
- Valtice	6	13
- ŝezelnicĉafi /fervojistoj/	6	16
- informoj de sekretario	6	26

#### Esperantologio, interlingvistiko:

- sociopolitikaj aspektoj	1	10
- bibliografio pri Esperanto	3	7
- pri unu pioniro	3	10
- por diskuto	3	11
- ni parolu pri faktoj	3	12

#### Recenzoj:

- Gutaro	1	19
- Seksa egaleco	3	13
- La internacia lingvo, sciencaj aspektoj	3	14
- Al abelujo ĝi flugas	3	14
- Panorama rigardo	4	16
- Historio de Esperanto	4	17
- Doktoro Bovoro	4	18
- Nova sistemo de E-o-stenografio	4	22
- Skizoj	4	22
- La vero pri vjetnam-ĉinaj rilatoj	4	23
- Bibliografio 1890 - 1980	4	29
- Terminero	5	17
- Veksilologia literaturo	5	18
- Nguyen Trai	6	10
- principoj kaj konjugaciaj formoj en E-o	6	11

#### Informoj el mondo, turistiko:

- promenoj en turismaj aranĝoj	1	16
- internaciaj E-o-aranĝoj	1	28
- turistiko	2	18
- konsultiĝo en Sofio	3	4
- internacia panoramo	3	15
- ILEI - simpozio	3	17
- turistiko	3	26
- tradicia loko	4	7
- internacia panoramo	1,4,5,13,27,12	12
- Varne vin salutas	6	18
- internacia renkontiĝo ĉe Berlin	6	28

#### Lingva angulo, literaturo:

- diferenco inter prepozicio "apud" kaj "ĉe"	1	11
- niaj literaturistoj	2	4
- Eva Seemannová	2	8
- kuriozaĵoj logikaj kaj nelogikaj	3	8
- kioma horo estas	4	11

- ĉu esperantigi personajn nomojn	4	12
- angla malsano fuŝas nian Esperanton	4	13
- ĥo dialekto	6	17
- ĉu Esperanto estas facila lingvo?	6	19

#### Konkursoj:

- konkurso de Monda turismo	1	15
- IVa E - kultura festivalo	1	18
- krucenigmo	1,3,4,5,6,20,22,31, 22,25	
- internacia konkurso de infanoj	2	9
- 35 jaroj de ĈSSR - konkurso	2	14
- mozaiko el la Kultura festivalo	5	9
- amikeco 1981 - konkurso	6	6

#### Fotografadoj sur la titolpaĝoj:

M.Labaŝta : Narcisoj	1
M.Labaŝta : Praha	2
Arkivo : Stockholm	3
Zd.Křimský : Stockholm - malnovurba parto	4
M.Labaŝta : Praha	5
M.Labaŝta : Altaj Tatroj	6



STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 00 Praha 1, vydávaný pro potrebu členů svazu. Vychází 6 x ročně. Za obsah tohoto čísla odpovídá PhDr Jaromír Jermář CSc a Zdenko Křimský. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven Praha. Předáno do tisku 31.1.1981. Dohledací pošta Praha 07, snížený poštovní poplatek povolen ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1 - 1267 ze dne 6. dubna 1979.

STARTO - presorgano de ĈEA, Jilská 10, 110 00 Praha 1, ĈSSR. Aperas sesfoje jare.



# KOVOVÉ METALAJ REMIZOJ GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbot-  
avolo - duparta pordego - deklina  
tegmento - sen planko - facila mun-  
tado au sur submuro au sur ebe-  
na tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs  
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs  
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs  
Largo 3030 mm alto 2450 mm estas  
egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malon-  
ga tempo 1-2 semajnoj liveras

## INKLEMO

PRAHA Kooperativo

Skribajn mendojn sendu al la adre-  
so de komerca fako: INKLEMO PRA-  
HA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA  
9, Spojovací 11, a telefonu al n-ro 83 09 49.  
Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la  
kooperativo. Transporton ni povas certigi. Re-  
mizojn ni liveras nur al privatuloj.



## VESTAJON EL TRIK MATERIALO

---

POR ĆIUTAGA UZADO, POR SPORTO

---

KAJ ANKAŬ POR SOCIETO

---

PROPONAS AL VI

---

DOMO DE MODO

---

*Финрай*

---

BRATISLAVA

---